

Bulteno de la Nordfrancia Esperanto-Federacio – Fondita en 1908



La Vorto de la Prezidanto

Laboro kaj plezuro!

“Unue, dankegon al Arlette PLUTNIAK, kiu dum tri jaroj plej efike estris nian Nordan Federacion. Ŝi mirinde laboris kaj sukcese generis energion al siaj helpantoj, ĉiam en tre amika kaj fruktodona etoso.

Due, dankon al ĉiuj, kiuj elektis min kiel prezidanton, dum tiu lasta regiona kongreso tre bone organizita de Xavier DEWIDHEM, en la gastema urbo Halluin, la 14an de Aprilo 2013.

Plenumante miajn “diversajn taskojn”, mi kompreneble bezonas vian helpon kaj esperas ne tro rapide duŝi vian entuziasmon.

Laboro ne mankos! Belega projekto atendas nin! Partoprenante la 98an Universalan Kongreson en Rejkjaviko, ni profitis la okazon por prezenti la jubilean centan en Lille, kaj inviti la kongresanojn: preskaŭ ĉiuj kore promesis partopreni. Francine kaj Claude LONGUE-ÉPÉE, Anne-Marie DUPÉCHAUD, mia edzino, kelkaj helpemaj francoj kaj mi mem disdonis ĉirkaŭ 1 000 flugfoliojn bele faritajn de Xavier al vojaĝemaj japanoj, koreoj, Usonanoj, Kanadanoj, kroatoj, poloj, rusoj, germanoj, belgoj... Ĉu nia kara regiono aperos alloga al tiuj vizitontoj

Sekvo p. 2 • • •

Vivo de la Nordfrancia Federacio

Araso organizis la tutmondan sesion de la KER-ekzamenoj

Sabato la 8an de Junio 2013 je la 7a matene, kun 10 minutoj da malfruo, Edmond kaj mi (Arlette) alvenas en la korton de la Kultura Oficejo de Araso. Jam atendas Didier TOULLER kaj Daniel CALVOS. Hodiaŭ okazos grava evento : 17 kandidatoj de la Norda Federacio trapasos la tutmondan KER-sesion de Esperanto-ekzamenoj. Ne pli ol unu horo restas por pretigi tri diversajn salonojn. De la malsupra al la supra etaĝo ni instalas la tablojn, sur kiujn ni algluas la devigajn informojn. Sur la tri salonpordoj legeblas : “*Ne ĝenu, ekzameno! Silence, examen!*”

Ekde la 8a alvenas Claudine ROBBE kaj Daniel WITRANT por instali en etan salanon ĉiujn bongustajojn, kiuj ebligas al la kandidatoj iom malstreĉiĝi kaj refreŝiĝi dum la diversaj paŭzoj. Hélène MAZZEGA kaj Chantal WLODARSKI anstataŭos ilin dum la posttagmezo.

La unuaj kandidatoj komencas alveni. Edmond akceptas ilin laŭ ilia alveno, li subskribigas la diversajn

devigajn dokumentojn, kaj klarigas, kiel disvolviĝos la ekzamenoj.

Ĉi-jare ni organizas la kompletajn ekzamenojn: la skribajn kaj la parolajn partojn, kiuj konsistas el enlaboratoria aŭskultado de tekstoj kaj antaŭkomisiona individua parolado, en la tri niveloj : B1, B2 kaj C1.

La skribaj partoj de la ekzamenoj okazas dum tri horblokoj : de la 9a ĝis la 13a por la nivelo C1, de la 10a ĝis la 13a por la nivelo B2 kaj de la 11a ĝis la 13a por la nivelo B1.

Claude LONGUE-ÉPÉE kun Katja BOEN oficiale malfermas la sigelitajn kovertojn entenantajn la ekzamenojn, kaj post la aŭdigado de la informoj registritaj de Katalin KOVÁTS regas en la salono tia silento, ke eĉ flugado de muŝeto aŭdeblas. Tion konstatis kun granda miro la du gazet-jurnalisto, kiuj venis por foti kaj raportoti pri la evento.

Dum tri aliaj tempblokoj : de la 9a ĝis la 9a40 por la nivelo B2, de la 10a ĝis la 10a40 por la nivelo B1 kaj de la 13a30 ĝis la 14a10 por la nivelo C1, Anna DUPECHAUD kun la helpo de Didier TOULLER, Daniel

eĉ dum tiaj kutime dezertaj semajnoj someraj? Kia bela trafinda celo!

Laboro certe, sed ĉefe plezuro por varbi kaj konigi Esperanton al pli da homoj, por viviĝi niajn klubajn agadojn kaj nian regionan federacion.

Plezuro ankaŭ kiam ni baldaŭ renkontiĝos en **Stella-Maris**. Mi esperas renkonti vin ege multnombrajn. Profitu tiun jubilean 25an Eŭropan rendezuon, kiun majstre organizas ekde pluraj jaroj nia kara prezidinto **Arlette**. //

Michel **DECHY**



CALVOS kaj **Hélène MAZZEGA** okupiĝas pri la aŭdigado de tekstoj.

Premiero por tiu ekzamensesio estas la trapasado de la individuaj paroladoj antaŭ neĉeestanta komisiono de ekzamenantoj. Mi devas konfesi, ke multajn streĉojn mi spertis antaŭe: uzi modernajn teknikojn, komuniki per Skajpo, ne estas miaj plej ŝatataj okupoj. Feliĉe **Julia HÉDOUX** akurate alvenis el Bulonjo-ĉe-Marjo por helpi min zorgi pri tiu parto. Kaj mirakle, la tutan tagon ĉio mirinde funkciis! Ekde la 8a30 ĝis la 16a30, 15 kandidatoj laŭvice respondis la demandojn de la

ekzamenantoj. Matene **Katalin KOVÁTS** (en Nederlando) kun **Renato CORSETTI** (en itala vilaĝeto), posttagmeze **Márta KOVÁCS** (en Hungario) kun **Zsófia KÓRÓDY** (en hungara vilaĝeto) pridemandis la kandidatojn.

Mi ege ĝuis la tagon : mi miris, kiel kompetente, afable kaj lerte **Katalin** kaj **Márta** scipovis revertigi demandojn por revigligi interparoladon; mi miris, kiamaniere ĉiuj kandidatoj enscenigis bonegajn rolludojn kun la ekzamenantoj; mi estis kortuŝita konstati, ke senescepte ĉiuj kandidatoj strebis kiel eble plej bone respondi, rakonti kaj doni sian opinion. La oficialaj rezultoj pri tiu parto de la ekzameno montras, ke ĉiuj kandidatoj sukcesis almenaŭ 60-procente. Gratulon al ili! Ni ĝojas kaj fieras : tio estas granda rekompenco por la preparaj Esperanto-kursoj en nia tuta regiono.

La organizo de tiu ekzamensesio postulis multe da laboro, ankaŭ multe da streĉo. Tamen la perfekta kaj miriga organizado de **Katalin KOVÁTS**, kiu regule sendis precizajn informojn kaj scipovis sproni kompetentan teamon de kunlaborantoj, ebligis realigi tion. Dankon al **Katalin** pro ŝiaj senĉesa sindonemo kaj efikega organizado. Dankon al **Márta KOVÁCS**, kiu neniam renkontis antaŭe. Mi trovis en ŝi ege kompetentan pedagogon.

Dankon al **Renato CORSETTI** kaj **Zsófia KÓRÓDY** pro ilia helpo. Dankon al la organizintoj kaj helpintoj: **Edmond PLUTNIAK**, **Claude LONGUE-ÉPÉE**, **Katja BOEN**, **Anna DUPECHAUD**, **Julia HÉDOUX** kaj al **Jean HENNEBERT**, kiu plurfloje provis la kvaliton de la retkonekto antaŭ la ekzamensesio. Dankon al la tuta teamo de **Arras-Espéranto**, kiu volontule helpis pri la materialaj instaladoj.

Apartan dankon kaj gratulon al ĉiuj el la 17 kandidatoj, kiuj kuraĝe, serioze kaj intense laboris la tutan tagon. Danke al ili Araso fieras esti ĉe la unua tutmonda rango laŭ la poentoj, kaj ĉe la dua laŭ la nombro de partoprenantoj. Indas listigi ilin en la ĉi-suban tabelon por valorigi ilian kuraĝon. La estro kaj vicestro de la Kultura Oficejo varme gratulis nin pro la organizo, kaj konsciis pri la solenaĵo de la evento.

Post tiu sukcesa organizaĵo, dum kiu ni amplekse reklamis Esperanton, ni ne maltrafu novan okazon altigi la prestiĝon de nia kara lingvo, partoprenante nian jubilean Eŭropan Rendezuon la 16an-17an de Novembro 2013 en **Stella-Plage**.

Tie **Katalin KOVÁTS** oficiale enmanigis la diplomojn al la sukcesintoj.

Raportis **Arlette PLUTNIAK**

NOMOJ	SKRIBA			PAROLA			URBO (LANDO)
	B1	B2	C1	B1	B2	C1	
<i>Richard SZLASKI</i>	X			X			<i>Arras</i>
<i>Jeannine RAULT</i>				X			<i>Arras</i>
<i>Elise DEPLA</i>	X						<i>Dunkerque</i>
<i>Gilbert ODDOUX</i>	X						<i>Dunkerque</i>
<i>Vincent PEINGNEZ</i>		X			X		<i>Lille</i>
<i>Fabrice LEMAIRE</i>		X			X		<i>Noeux-les-Mines</i>
<i>Vincent COUROUBLE</i>		X			X		<i>Marseille-en-Beauvaisis (60)</i>
<i>Eddy DERICKE</i>		X			X		<i>Boulogne-sur-Mer</i>
<i>Joëlle MULLER</i>					X		<i>Arras</i>
<i>Corinne BOURGOIS</i>					X		<i>Noeux-les-Mines</i>
<i>Jacky RAMON</i>					X		<i>Arras</i>
<i>Jean-Charles TREBOUET</i>			X			X	<i>Auneuil (60)</i>
<i>Denis FLOCHON</i>			X			X	<i>Namur (Belgio)</i>
<i>Laurent ZIBELL</i>			X			X	<i>Lille</i>
<i>Roland PLATTEAU</i>						X	<i>Arras</i>
<i>Jean HENNEBERT</i>						X	<i>Arras</i>
<i>Marianne DUNLOP</i>						X	<i>Arras</i>

La Nordfrancia Federacio en UFE kaj UEA KOMITATKUNSIDO DE UFE de la 8-a kaj 9-a de Majo en Artigues

Okazis en Artigues-près-Bordeaux, de la 4-a ĝis la 11-a de Majo 2013, unuafoje, komuna kongreso de *Esperanto-France* kaj IFEF (Internacia Fervojistaj Esperanto-Federacio).



Ĝi estis tre bone organizita kaj venigis multajn diversnaciajn esperantistajn fervojistojn.



Okazis interesaj ekskursoj; laŭ Bordoza, Ĝirondo, Arkaŝono, ktp. Ankaŭ estis altkvalitaj spektakloj, interalie kun Kajto kaj Interkant' (pri *Carmen*).

Dum la Ĝenerala Membrokunveno de UFE estis elektitaj novaj komitatanoj. Laŭ decido de la Norda Federacio, *Claude LONGUE-ÉPÉE* restas la reprezentanto de la federacio en la UFE-komitato.

Li resumis ĉi-sube la decidojn de la UFE-Komitatkunsidoj, kiuj pli malpli concernas nian federacion kaj ĝiajn membrojn.

Komitatkunsido de la 8-a de Majo. Antaŭ la Ĝenerala Membrokunveno.

Nova tarifo por LME

La prezo estos malpliigita al 8 €,

anstataŭ 18 €. Sed nur por la unua jaro de abono.

Nova kotizo por "Esperanto-Aktiv"

Nun tio kostas, por printi kaj sendi la paperajn printitajn ekzemplerojn: ĉirkaŭ 1000 €.

Por malpliigi la kostojn: oni ne pagigu la paperan version; sed oni instigu la abonantojn indiki siajn retadresojn.

Venontaj kongresoj

Por 2014, la loko estas ne jam decidita. *Claude LONGUE-ÉPÉE* emfazas pri la neceso daŭrigi konstantajn rilatojn kun SAT-amikaro, kaj konservi komunajn kongresojn (principe ĉiun trian jaron, do en 2014).

Komitatkunsido de la 9-a de Majo. Post la Ĝenerala Membrokunveno.

Kun la novelektita Komitato.

Elekto de la Estraro.

Prezidanto: *Axel ROUSSEAU*
Vicprezidanto por la UK en Lille 2015: *Xavier DEWIDHEM*

Vicprezidanto por la Eksteraj Rilatoj:

Didier LOISON

Kasisto: *Anne-Emilie RAVACHE*

Vickasisto: *Sébastien MONTAGNE*

Sekretario: *Aleks KADAR*

Vicsekretario: *Raymonde COQUISART*

Dosiero por oficiala poŝtmarko por UK-2015

Raymonde COQUISART zorgas pri tiu afero. Ŝi jam multe klopodis al la oficialuloj.

Ŝi sendos dosieron al ministro *Fleur PELLERIN*, kiu finfine elektos la eventualan poŝtmarkon.

Klubo 2000-2014, uzo de la kolektita mono

Venontjare Klubo 2000 helpos al profesiigo de homoj por instrui kaj ĉiĉeroni.

La duono de la resto de la kaso de Klubo 2000-2012, post repago de

ENHAVO

ASOCIAJ TEMOJ

Fede ★ Araso organizis la tutmondan sesion de la KER-ekzamenoj	p1
Fede ★ Komitatkunsido de UFE en Artigues	p3
E080 ★ Agad-raporto el Amieno	p4
ArE ★ Agad-raporto el Araso	p4
ArE ★ Ho, mia KER!	p5
DuE ★ Agad-raporto el Dunkirko	p7
LVE ★ Agadraporto el LVE	p8
LVE ★ Vizito de Petro <i>CHRDLE</i> kaj <i>Milada BROUMOVÁ</i>	p9
VaE ★ Agad-raporto el Valencieno	p10
VaE ★ <i>Lucien JONAS</i>	p10
VaE ★ Agad-raporto el Valencieno	p13

KER-ekzamenoj, estos uzata, por helpi homojn de malriĉaj landoj trapasi KER-ekzamenojn.

Elekto de reprezentanto ĉe UEA



Claude NOURMONT estas elektita por reprezenti UFE.

FEI-ekzamenoj

Michel DECHY restas unu el la reprezentantoj de UFE en FEI.

Estos ebleco trapasi triagradan FEI-ekzamenon post sukceso en B2-KER-ekzameno.

Afrika agado

Esperanto-France eldonis varbanoncon por kolekti monon por Afrika kongreso.

Sendi la donacojn al UFE, precizigante: "por Afrika Kongreso".

Redaktita de *Claude LONGUE-ÉPÉE*

El Amieno

Agad-raporto kaj venontaj eventoj el Amieno

La rekomencigo-kunveno de Septembro 2013

Tiu rendezvuo okazis en Salŭelo (*Salouël*) la 13an de Septembro vespere en ĉambro "Les Aubretias".

La celo de tiu post-feria renkontiĝo estis kune organizi aktivecojn por vivigi la asocion, krom kursoj.

En *Espéranto 80* estas tute facile vivigi kursojn, sed bedaŭrinde estas sufiĉe malfacile vivigi kulturalan trans-kursajn momentojn.

Lastajn jarojn, la "Distraj Sabatoj" estis momentoj por interŝanĝi inter membroj ekster la kursoj. Bedaŭrinde, iom post iom nur malgrandeta kerno de la asocio obstine kunvenis sabate (ofte la malplej najbaraj!).

Same kiel kiam ni akceptas eksterlandanojn, nur malmultaj vizitas la prelegon. Kial estas tia la situacio? Eble pro timo de nekomprenemo pro nesufiĉo de la lingvo-nivelo? Eble pro manko de tempo? Eble pro manko de instigo? Eble pro mem-takso de la

lernantoj, kiu imagas sin, ne kiel plenaj membroj, sed nur kiel lernantoj?

Pri tio, ni kune diskutis kaj ni trovis novajn agojn. Ni devas trankviligi la membrojn, kaj klare instigi ĉiujn membrojn ne nur lerni paroli en Esperanto ĉar ĝi estas bela ideo, sed instigi ilin malkovri la kulturon de Esperanto, malkovri alimaniere la aliajn membrojn, renkonti homojn, aŭ tute simple esti kune por aŭskulti Esperanton kaj alkutimiĝi al ĝia belsoneco.

Jen finfine la projektoj de la jaro:

– Ni planas akcepton de ĉina ĵurnalisto. *Cyrille DÉCOUTURE* okupiĝos pri rilato al la organizanto kaj provos kontakti asocion de ĉinaj studentoj kaj aliajn asociojn pri ĉina Tiaĉisporto. *Danielle DOLLÉ* kun helpo de amikoj okupiĝos pri kontakto al la ĵurnalistoj.

– La "Distraj-n Sabatoj-n" ni plu vivigos kaj rendezvuos ĉiujn du monatojn. Unufoje en Salŭelo, unufoje en Plaŝjo-Bujono. Jen la listo de la agoj:

enigmoj, kantoj (aŭskultado kaj kantado), ludoj, lego de fabeloj, spektado de filmetoj en Esperanto, eble iam prelegetoj aŭ teatraĵoj ktp.

– Denove *Daniel DEVIS* okupiĝos pri tri kursoj marde kaj jaŭde. Horaroj tamen iom ŝanĝiĝas.

– *Daniel DEVIS* kaj *Danielle DOLLÉ* plu gvidos atelieron pri kominukado tra Esperanto-reto kaj per la lingvo. La tagmeza ateliero okazos jaŭde de la 12a kaj triono ĝis la 13a kaj duono ekde la 5a de Octobro.

– *Bernadette MANIER* plu vivigos la kluban korespondadon kun la esperanto-klubo de Dortmund (notinde: Amieno jam estas ĝemeligita al Dortmund). La kurs-grupoj sendos al ŝi la tekstojn, kaj ŝi resendos la informojn.

– *Pascal CADART* instruos baldaŭ pri nova Blog-retejo, kiun ni uzos por asocia interna informado.

Redaktis *Cyrille DÉCOUTURE*

El Araso

Agad-raporto el Araso


Merkredon la 1-an de Majo 2013

en Araso ni starigis (kiel ĉiujare) Esperanto-budon ĉe la surstrata Libro-salono. *Guy CAVALIER*, prezidanto de SAT-Amikaro, venis de Parizo kun stoko da belaj libroj, kaj helpis niajn deorantojn dum la tuta tago. Krome tre plezurigis nin la amika vizito de *Xavier VILAIN*, prezidanto de *Dunkerque-Espéranto*, kaj kasisto de la Norda Federacio.

Ĉar mi ne ĉeestis, mi petis de pluraj geasocianoj informojn pri la okazaĵo. Iuj ĉeestintoj asertas, ke multaj pasantoj vizitis nian budon, kaj ke la belaj libroj bone vendiĝis. Laŭ aliaj atestantoj, paŝis malpli da homoj ol en la antaŭaj jaroj, kaj nur malmultaj el ili haltis kaj interesiĝis pri Esperanto.

Kelkaj opinias, ke la ĉi-jara loko ne vere taŭgis, sed aliaj diras, ke jaron post jaro la tuta Libro-salono pli kaj pli ŝrumpas...

Kvankam mi antege observis la nazon de miaj atestantoj, mi rimarkis neniun plilongiĝon. Eblas do konkludi nur la jenon: tiuj el niaj legantoj, kiuj bezonas pli precizajn sciigojn, nepre vizitu mem nian Esperanto-budon okaze de la venontjara Libro-salono en Araso!

 **Sabaton la 8-an de Junio** trideko da esperantistoj ĉeestis en la Arasa Kultura Oficejo: iuj por trapasi KER-ekzamenon, la aliaj por akcepti, trinki, manĝetigi, kuraĝigi la

unuajn, sed ankaŭ por malhelpi ilin friponi tro intense.


Sed tion (kaj ankaŭ pliajn aferojn) vi jam scias, ĉar vi tutcerte legis la prian artikolon de *Arlette PLUTNIAK*...


Ĝis lundo la 24-a de Junio

okazis niaj Esperanto-kursoj en Araso. Kvankam jam forvojaĝis pluraj el niaj feriantaj geklubanoj, tiutage tamen partoprenis la kurson dek unu homoj, danke al la afabla ĉeesto de du neatenditaj vizitantoj: *Maryvonne* kaj *Jean-Yves* el la regiono "Pays de la Loire". Tendumante en nia departemento ili ĵus eksciis pri nia ĉiulunda rendezvuo, kaj esperis renkonti siajn geamikojn *Arlette* kaj *Edmond PLUTNIAK*.

Bedaŭrinde malĉeestis kaj *Arlette* kaj *Edmond*, do ni provis konsoli niajn vizitantojn per malavara donaco de senpaga gramatika slipo. Ĉar tio videble ne sufiĉis, nia prezidanto *Jacky RAMON* finfine decidis mallongigi la kurson, kaj energie malŝtopis kelkajn botelojn.

Studjafino bona, ĉio bona!


 **Mardon la 23-an de Julio** mi lastan fojon gvidis kurson en la *MJC de Nœux-les-Mines*. Kvin el miaj ses tieaj gelnernantoj asertis, ke ili intencas ekde Septembro partopreni la Arasajn kursojn.

 **Jaŭdon la 22-an de Aŭgusto** verŝajne okazis en *Le Touquet* koncerto de la rusa esperantisto

Андрей КОРОБЕЙНИКОВ (t.e. Andreo **KOROBĜNIKOV**), kadre de la festivalo "*Les Pianos Folies*".

Kelkajn semajnojn antaŭe *Arlette* kaj *Edmond PLUTNIAK* proponis, ke multaj esperantistoj ĉeestu en la koncertejoj, por instigi diversajn gazetojn aperigi artikolojn kaj reklami Esperanton.

Bedaŭrinde, ĉar mia ĉefredaktoro deziris ricevi ĉi tiun raporton kiel eble plej frue en Aŭgusto, niaj legantoj ne ekscios ĉi tie, kiom da samideanoj efektive ĉeestis.

 **London la 16-an de Septembro** verŝajne rekomencigis la Esperanto-kursojn en Araso. Redaktante ĉi tiun raporton mi

kompreneble ankoraŭ ne konis la nombron de la ĉeestontoj, des pli ke – laŭdire pro ekonomiaj kialoj – la sama postulema ĉefredaktoro malpermesis, ke nia redakcio konsultu kompetentan aŭguristinon...

Nia retejo:

<http://arras.esperanto-nord.org>

Nia adreso:

Office Culturel

61 Grand'Place

62000 ARRAS.

Esperanto-kursoj

– lunde de la 18-a ĝis la 20-a (krom dum ferioj).

Raportis **Jean HENNEBERT**
la 8-an de Aŭgusto

El Araso

Ho, mia KER!

Pasintjare, 9-an de Junio, 14a30 – Hejme

– Mi: Uf! Finite! Kia elĉerpa mateno!
Tiu skriba C1-ekzameno estis terure laciga. Neniam plu mi trapasos...

– Edzino: Ho! Ne promesu! Jam en 2004 post la duanivela ekzameno en Araso vi asertis, ke vi neniam plu trapasos ekzamenojn!

– Nu, vi pravos... Sed nun restas nenio por trapasi (krom la kvara nivelo de F.E.I., sed mi ne intencas fariĝi akademiano...). En 2010 temis pri la tria nivelo, en 2011 mi ne povis rifuzi trapasi la ekzamenon pri Kapableco, kaj hodiaŭ la skribaj KER-ekzamenoj unuafoje okazis en Araso, do, pro solidareco kun...

– Jes ja! Kaj ĝuste tial vi nepre trapasos venontjare la parolan parton de la C1-ekzameno!

– Ne, tute ne! Neniam eblos trapasi ĝin en Araso, ĉar la hungaraj ekzamenantoj neniam veturos tien. Krome, la tuta loka esperantistaro scias, ke mia sanstato malhelpas min vojaĝi, do mi povas nun solene aserti, ke mi neniam plu trapasos kiun ajn ekzamenon!

Ĉi-jare, 17-an de Februaro, 20a15 – Hejme

– Mi: Fek!

– Edzino: Ĉu? Kio okazas al vi?

– Mi ĵus ricevis retmesaĝon de la organizantoj.

– Pri kio temas?

– Ba... Nenio... Nur banalaĵoj...

– Ĉu pro simplaj banalaĵoj vi aŭdigis malagrablan fivorton?

– Nu... Ŝajnas, ke ĉi-jare eblos trapasi en Araso la parolajn KER-ekzamenojn, probable per *Skype*.

– Ba! Tio ne koncernas vin! Vi asertis pasintjare, ke...

– Fakte temas pri ne tro temporaba afero... Krome, ege necesas kuraĝigi la organizantojn, danke al kies senĉesaj klopodoj ekzistas tiu util-ega ekzameno.

– Ha, ha! Kion mi diris al vi pasintjare?

– Ĉu vi imagas, ke mi parkerigis ĉion, kion vi diris pasintjare?

– Almenaŭ agnosku, ke plian fojon mi pravis!

– / / / / / / / / / / [cenzurita]

8-an de Marto, 18a05 – MJC de Nœux-les-Mines

– Lernanto: Mi sekvis vian konsilon, kaj elŝutis el *Edukado.net* la son-

registraĵojn kaj la demandarojn. Mi provis solvi hejme la aŭdkomprenan teston.

– Mi: Je kiu nivelo?

– Nu, mi komencis per la plej facila, t.e. B1.

– Ho! Tio estis ege tro simpla por vi!

– Nu, aŭskultante la registraĵojn kaj legante la demandojn mi ĉion komprenis. Sed kiam mi devis kompletigi la demandaron, ĉiuj aŭditaj informoj intermiksiĝis en mia menso, do la ekzerco fakte ne estas tiel facila...

– Mi certas, ke vi ŝercas!

9-an de Marto, 10a32 – Hejme

– Mi: Nekredeble... Li pravis! Teorie tiu parto de la ekzameno celas taksii la aŭdkomprenon de la kandidatoj. Sed fakte...

– Edzino: Ĉu vi denove babilas kun vi mem? Mi konas kompetentan geriatron...

– Ho! Tute ne temas pri maljuneco! Ankaŭ mia 36-jara plej bona lernanto spertis la samajn malfacilaĵojn.

– Ĉu ankaŭ li senĉese parolas laŭte al si mem?

– Ne! Temas pri malfacila ekzerco de la parola KER-ekzameno...

- Ĉu? Mi kredis, ke Esperanto estas facila lingvo... Ĉu vere ekzistas malfacilaj ekzercoj?
- Nu, la lingvo ja estas pli facile lernebla, ol kiu ajn nacia lingvo! Sed ŝajnas, ke iuj eminentuloj decidis kompliki la ekzamenojn, por ke la kandidatoj ne tro facile sukcesu.
- Ĉu vere eblas kompliki facilan lingvon?
- Se vi konsentus lerni ĝin, vi tuj komprenus min!
- Mi ofte dubas, ke ekzistas lingvo, per kiu mi povus kompreni vin...
- Aŭskultu! Duonŝerce mi ĵus provis la unuan specimenojn de *Edukado.net* por la nivelo B1, jes: B1, la plej facila!
- Kaj mi vetas, ke vi malsukcesis...
- Mi tuj perfekte komprenis ambaŭ sonregistraĵojn kaj ĉiujn demandojn. Sed kiam la registrita voĉo anoncis, ke mi devas nun respondi la demandojn, mia memoro plurfoje hezitis inter pluraj ebloj, kaj mia mano ofte hezitis inter frazo tro longa por la malgranda proponita respondo-ĉelo kaj frazeto tro mallonga por lingva ĝusteco. Dume pasis rapidege la minutoj!
- Jen la telefonnumero de la geriatro...
- Ho ĉesu! Jam kiam mi estis juna, mi ege pli bone memoris legitaĵojn, ol aŭditaĵojn.
- Kial vi ne konsultus oto-rino-laringologon?
- Ne temas pri tio! Provu mem! Se mi aŭdigus al vi franclingvan tekston, kaj tuj poste starigus pri ĝi dekon da demandoj, ankaŭ vi konstatus, ke temas ne nur pri aŭdkomprena kapablo, sed ĉefe pri memorkapablo. Krome, se mi devigus vin respondi rapide al demandoj ne sufiĉe precizaj, kaj skribi la respondojn sur mallongaj linioj, mi certas, ke vi ofte hezitus, kaj kvin minutoj ne sufiĉus por efike plenumi la taskon!
- Ĉu temas pri la ekzameno, kiun vi trapasos en Junio?
- Jes, sed je la nivelo C1...
- Se tiel estas, vi prefere rezignu!

6-an de Majo, 22a35 – Hejme

- Mi: Palinuro... Kankro... Omaro...
- Edzino: Ĉu tion ni manĝos

- morgaŭ?
- Ĉit! Vi ja vidas, ke mi parkerigas vortilstojn...
- Ĉu vi intencas trapasi ekzamenojn pri krustuloj?
- Ne, sed mi ne scias, pri kio deziros paroli la ekzamenantojn...
- Kiu ekzamenantoj? Vi diris al mi, ke vi devos aŭskulti du tekstojn, kaj respondi skribe.
- Ah! La parola ekzameno konsistas el du partoj. En la unua parto, mi devos babilu kun du ekzamenantoj, komenti unu bildon kaj unu tekston, kaj ankaŭ partopreni en mallonga rolludo.
- Espereble vi ne rolos kiel salikoko!

27-an de Majo, 03a17 – Hejme

- Edzino: *Jean!!!*
- Mi: Kio???
- Kio okazas? Kial vi vekis min? Ĉu estas problemoj?
- La ĉefa problemoj estas, ke antaŭ dek minutoj vi vekis min!
- Ĉu mi? Sed mi estis dormanta!
- Jes ja, kaj vi eĉ estis songanta, kaj tre laŭte parolanta!
- Pri kio?
- Nu, pri iu "Alteo", kies nomon vi ripetis almenaŭ sepfoje... Ĉu temas pri blondula junulino?
- Kiu blondulino? Ŝajnas al mi, ke "alteo" estas la nomo de iu vegetaĵo, kiun mi sensukcese provis parkerigi hieraŭ vespere! Cetere la blondulino nomiĝas...
- Kiu blondulino???
- Neee, neee... Mi ŝercas. Dormu!

31-an de Majo, 19a55 – MJC de Nœux-les-Mines

- Mi: Antaŭ ol foriri, mi memorigas al vi, ke post ok tagoj okazos la KER-ekzameno en Araso. Mi esperas, ke vi solvis hejme la duan prov-ekzamenon de *Edukado.net* por la nivelo B2...
- Gelernantoj: Jes, ĝi ne estis pli malfacila ol la unua, kiun ni solvis ĉi tie antaŭ tri semajnoj. Kaj vi, ĉu vi trovis iom da tempo por la C1-provekzameno?
- Jes, mi ĵus pritraktis la unuan specimenojn de *Edukado.net*. Je la nivelo C1, oni aŭskultas la tekstojn nur dufoje! Feliĉe la parolfluo estas sufiĉe malrapida, do eblas dum la

aŭskultado noti la ĉefajn informojn, kio poste tre faciligas la laboron. Mi provas la duan specimenojn tri tagojn antaŭ la ekzameno...

8-an de Junio, 13a15 – Arasa Kultur-Oficejo

- Alia kandidato: Ĉu bone disvolviĝis via per-Skajpa interparolado kun la jurio?
- Mi: Nu, mia lango plurfoje stumblis, kaj mi iom tro ofte balbutis, sed la ekzamenantoj ŝajne komprenis min...
- Post kvaronhoro komenciĝos la aŭdkomprena testo, kaj mi iom timas ĝin...
- Nu, ankaŭ mi timis ĝin, sed danke al la du specimenoj de *Edukado.net* mi nun scias, ke mi kapablas sukcese, ĉar ne perdante la fadenon mi povis facile noti la plej gravajn ideojn.
- Ha! Bone! Tio rekuragiĝas min...
- Tamen atentu! Kiam mi solvis hejme la unuan provekzamenon, mi rapide respondis la ok demandojn pri la unua teksto, kaj poste enuis dum du minutoj... Nur kiam oni petis, ke mi legu la duan demandaron, mi rigardis la duan paĝon, kaj tiam malkovris ses pliajn demandojn pri la unua teksto!!! Tial mi konsilas, ke vi tuj zorge kontrolu la enhavon de la dua paĝo!
- Ha, jes! Dankon pro la sciigo!

8-an de Junio, 14a10 – Arasa Kultur-Oficejo

- Mi: Fi! Tiu viro, kiu registris ambaŭ tekstojn, neniam aŭskultis la specimenojn de *Edukado.net*! Aŭ eble urĝis lin tuja rendevuo kun ĉarma belulino...
- Alia kandidato: Lia lango ja rapidis, kvazaŭ li estus brazila sporta reportero! Ĉu vi tamen sukcesis noti ion skribe?
- Jes, sed mi skribaĉis tiel haste, ke preskaŭ nenion mi sukcesis relegi poste!
- Mi do supozas, ke vi rezignis skribi dum la dua aŭskultado...
- Ne, mi iom stulte decidis labori plu laŭ la sama metodo.
- Ĉu vi tamen kapablis respondi?
- Nu... mi iom tro longe hezitis pri pluraj demandoj. Tial, kiam la viro

eklegis la duan tekston, mi ankoraŭ ne finis la unuan demandaron!

- Kaj do?
- Do mi kompletigis ĝin, kiam la voĉo petis, ke mi legu la duan...
- Ve! Ĉu tio signifas, ke vi respondis la duan demandaron ne leginte ĝin?
- Legi ne postulis multe da tempo, sed por decidi, kiuj el la proponitaj asertoj estas veraj aŭ malveraj, mi konfesu, ke mi kelkfoje lasis mian subkonscion gvidi mian skribilon...
- Ĉar vi malbone komprenis la aŭskultitajn tekstojn, ĉu ne?
- Tute ne! Mi certas, ke mi perfekte komprenis ĉion, sed mankis al mi sufiĉa tempo por trankvile rememori tion, kion mi aŭdis, kaj ankaŭ por pripensi kiamaniere mi respondu iujn malprecizajn demandojn... Mi vere ne komprenas, kial oni lasas al ni tiom malmulte da tempo por redakti la respondojn!
- Ba! Se vi ne sukcesis hodiaŭ, vi revenos venontjare...
- Ho! Tutcerte ne! Mi solene promesas, ke neniam plu mi trapasos ekzamenon pri memorkapablo kaj skriba rapideco!!!

9-an de Junio, 11a20 – Hejme

- Mi: Jes... JES! JEEEEES!!!
- Edzino: Ĉu vi spektas futballmatĉon?
- Ne! Mi ĵus ricevis la rezulton de la hieraŭa ekzameno, kaj mi brile sukcesis!

– Tio ne eblas! Hieraŭ vi diris al mi, ke la respondfolioj estas sendotaj al Hungario...

– Ve! Vi pravas. Mi relegu la retmesaĝon de Katalin... Ha! Mi legis tro supraĵe... Ŝi sendis nur la rezultojn de la interparolado kun la jurio. Nun necesas atendi proksimume kvin aŭ ses semajnojn, do la finan rezulton ni ekscios inter la 14-a kaj la 21-a de Julio...

8-an de Julio, 23a17 – Hejme

– Mi: Haaa! Jam kvar urboj ricevis la rezultojn de siaj kandidatoj! Baldaŭ mi scios, ĉu mi sukcesis...

9-an de Julio, 22a35 – Retpoŝte

- Mi: Saluton! Ĉu vi vidis, ke naŭ urboj jam ricevis la rezultojn?
- Lernanto: Jes! Espereble ni ricevos niajn antaŭ la fino de la semajno...

18-an de Julio, 21a48 – Retpoŝte

- Lernanto: Bonan vesperon! Ĉu vi rimarkis, ke dek ok urboj jam ricevis siajn rezultojn?
- Mi: Kompreneble! Mi kontrolas almenaŭ kvinfoje ĉiutage... Nur ses urboj ankoraŭ atendas, sed mi vetas dek eŭrojn, ke antaŭ dimanĉo ni konos niajn poentojn!

25-an de Julio, 11a23 – Retpoŝte

– Lernanto: Ĉu vi rimarkis, ke vi nun ŝuldas al mi dek eŭrojn?

31-an de Julio, 23a50

– Retpoŝte

- Mi: Ve! Ankaŭ en Hungario tutcerte nun ferias la universitatoj. Niaj rezultoj do ne alvenos antaŭ la fino de Aŭgusto.
- Lernanto: Mi ankoraŭ ne ricevis vian ĉekon...

1-an de Aŭgusto, 10a45 – Hejme

- Mi: Pfff... Ses urboj ankoraŭ atendas! Mi tamen – verŝajne senutile – revizitu pliafoje la retpaĝon pri individuaj rezultoj... Kiel kutime aperos la cifero "0" ĉe ĉiu rubriko... Nu, ni vidu! Retadreso... jen! Naskiĝdato... jen! Ek! Ĉu? Nekredeble!!! Jen miaj poentoj! Ha jes... necesas zorgi kontroli je ĉiu linio, ĉu mi atingis la atingendan minimumon... Jes... JES... JEEES!!! Nu... Ĉu mi ne mislegis? Neee... Ne... Ne... En ordo!!! Nun mi tuj kontrolu la rezultojn de miaj gelernantoj...


1-an de Aŭgusto, 10a55 – Telefone


- Mi: Ĉu vi deziras ekscii la rezulton de via ekzameno?
- Lernanto: Jes, kompreneble!
- ...
- Nu, diru! Ek!!!
- ...
- Kion vi atendas???
- Ke vi unue nuligu mian ŝuldon...


Reportis Jean **HENNEBERT**


El Dunkirko


Agad-raporto el Dunkirko

 **Sabato la 08-an de Junio 2013**, du klubanoj – *Élise* kaj *Gilbert* – trapasis la KER-ekzamenojn en Araso. Fine de Julio, ili ricevis la bonan novaĵon: ili sukcesis! (Ekzameno B1 - skriba parto). Do, ili baldaŭ ricevos oficialan kaj belaspektan diplomon.


 **Merkredon la 26-an de Junio 2013**, okazis la 21-a ĝenerala membrakunveno de nia asocio, en la kutima kunvenejo "*Brossolette*".

 **Merkredon la 18-an de Septembro 2013**, okazis la informkunveno de *Dunkerque-Espéranto*.

 **Merkredon la 25-an de Septembro 2013**, rekomenciĝis la Esperanto-kursoj (dufoje monate).

 **La 16-an kaj 17-an de Novembro 2013**, kelkaj klubanoj partoprenis la 25-an Rendevuon

de *Stella-Plage*.

 **Fine de Marto 2014**, nia asocio *Dunkerque-Espéranto* starigos budon en la 10-a Salono pri la Lingvoj en la interurba komunumdomo de Dunkirko, proponita de la asocio "*Association pour le développement des langues sur le littoral dunkerquois*" (ADLLD). Ĉirkaŭ 1 500 vizitantoj povos ekkoni la agadojn de la klubo.

Reportis *Élise* **DEPLA**

Agad-raporto el LVE jaro 2013

Ĉiunonataj renkontoj

Ĉiun trian jaŭdon de la monato (krom en Julio kaj Aŭgusto), je la 18-a h.30 en la Tenisa Klubo **FOS** en *Villeneuve d'Ascq*.

Ĉiusemajnaj Kursoj Universitato Lille III

Ĉiun mardon de la 18-a h.15 ĝis la 19-a h.45 por komencantoj (ĉirkaŭ 5 lernantoj), kaj dufoje monate lunde je la sama horo por praktikantoj (ĉirkaŭ 3 lernantoj) (kun la instruanto: *Michel DECHY*).

Kvartala Domo en la centro de Lille
Ĉiun mardon por komencantoj (ĉirkaŭ 4 lernantoj), je la sama horo (*Katja BOEN*).

Bersée

Ĉiun lundon je la sama horo, por komencintoj – ĉar ĉiuj eklernis dum la pasinta jaro! –, (7 lernantoj daŭre lernas ĉi jare) (*Claude LONGUE-ÉPÉE*).

Someraj Staĝoj

De la 8-a ĝis la 12-a de Julio, de la 18-a h.30 ĝis la 20-a, 5 seancoj por malkovri la lingvon.

– Same de la 26-a ĝis la 30-a de Aŭgusto (*Michel DECHY*). Poste, kelkaj daŭrigas la lernadon dumjare.

Universitato pri Libera Tempo

– 10 seancoj po 2 horoj, vendrede matene de la 10-a h. ĝis la 12-a h., ĉijare por nur 2 komencantoj (*Michel DECHY*).

La klubo ĉe Interreto

www.lve-esperanto.org

Multaj informoj pri la diversaj agadoj de nia klubo aperas en tiu bonega informilo. Sufiĉe ofte homoj kaj ĵurnalistoj kontaktas nin post vizito de tiu “fama” adreso kies zorgantoj estas *Katja BOEN* kaj *Xavier DEWIDHEM*.

Prelegoj kaj prezentado de la lingvo Esperanto

Kadre de “kulturaj semajnoj”,

prezentado de la lingvo en la kolegio *Saint-Exupéry* en *Hellesmes* la 9-an, la 10-an kaj la 11-an de Aprilo. La ses klasoj de la unua nivelo (6-a) ricevos “bonajn” informojn pri Esperanto. (*Michel DECHY*).

– Ĉiujare la elementaj lernejoj proksimaj al mia hejmo (*Anatole FRANCE* kaj *PICASSO*...) invitas min. Mi proponas 3 seancojn po 1 h.30 (prezentado de Esperanto, kurso pri matematiko en Esperanto kaj fine japana Sorobano same en Esperanto). Sed ĉi-jare, okaze de la eldono de “Tinĉjo”, televido ĉeestis la 2-an lecionon en *PICASSO*, poste aperis raporto ĉe la Televida Kanalo **France 3**.

– Novajo en 2013, kune kun la urbaj asocioj, kiuj zorgas pri instruado en elementaj lernejoj, sama prezentado en lernejo *Verhaeren*. Sed nia asocio *LVE* devus ricevi monhelpon pro tia agado... Do oni povas ĝoji pri tiu “valorigo” kaj oficiala agnosko de tiaj prezentadoj.

– La 30an de Januaro, *Mikaelo BRONŝTEJN* prelegis en la **MRES** pri la ĉefurboj de Rusio. Kiel kutime elstara prezentado. Poste, li regalis nin per siaj belaj kaj kortuŝaj kanzonoj.

– La 2an de Aprilo, en la urbo **ROUBAIX**, laŭ organizado de “*Union Rationaliste Métropole Nord*”, mi prelegis antaŭ 15 homoj: kutima prezentado de “nia kara lingvo” sed ankaŭ emfazo pri “la interna idio”.

– Denove la 11an de Junio mi prelegis en la urbeton “*La Bassée*”, invitate de la asocio “*Nord Madame*”. Kia plezuro havi tiom da virinaj oreloj, kiuj aŭskultas min! “*Nord Madame*”: Asocio nur por virinoj en diversaj urboj de la norda regiono.

Budoj okaze de diversaj aranĝoj

Festivalo pri la Bildstrioj en *Lys-lès-Lannoy*: la 9-an kaj la 10-an de Novembro 2013.

Dankon al ĉiuj deĵorantoj kaj vizitantoj!

Ekzamensesioj en Araso kaj en la **MRES** de Lille:

– **KER** Ekzamenoj (B1, B2 kaj C1), sabate la 8-an de Junio en Araso. Vidu ĉi-riilate en ĉi tiu numero la raporton kaj la kontribuon de *Arlette PLUTNIAK*;

– **FEI** Ekzamenoj (nivelo I kaj II), dimanĉe la 23-an de Junio en la **MRES** de Lille.

Renkontoj kun la Konkordo de Kortrejko.

Partoprenoj en diversaj aranĝoj

“**Lille2015**”, UK okazos en Lille: Post la vizito, la 16an de Julio de du delegitoj de **UEA** *Osmo BULLER* kaj *Clay MAGALHES*, kiuj responsas pri la organizado de la diversaj UK-oj. Danke al la bela prezentado de nia dosiero farita de *Xavier DEWIDHEM* kaj de la lokaj turismaj kaj urbaj instancoj, ni ege ĝoje informas vin ke la estraro kaj instancoj de **UEA** elektis nian urbon *Lille* por organizi la 100-an UK-on.

– “**La Templo de l’ Suno**”: Aperis fine de 2012 nova Esperanta traduko de Tinĉjo: “**La Templo de l’ Suno**”. Dankon al *Hervé GONIN*, kiu estas denove la tradukisto.

– Ĝenerala membrokunveno de la Norda federacio en **HALLUIN**. Okazis la 14-an de Aprilo, apud la belga landlimo kaj la “Lingva landlimo” en la “Eŭropregiono”. Ĝi estis granda sukceso. Vidu la raporton faritan en la Norda Gazeto de *Jean HENNEBERT*. Dankon al *Xavier DEWIDHEM* pro la organizado; kaj gratulon al *Guillaume ARMIDE* pro la majstra spektaklo.

– “La 25-a Eŭropa Rendevuo en *Stella-Plage*” okazos apud *Le Touquet* sabaton kaj dimanĉon 16-an kaj 17-an de Novembro 2013.

Vi ĉiuj estas invititaj al tiu nun tradicia renkontiĝo!...

– “Flandraj Ardenoj”: Piedmigrado

organizita tradicie de niaj flandraj amikoj. Ĝi okazis la dimanĉon 26-an de Majo.

– “98-a Universala Kongreso en Rejkjaviko” : De la 20-a ĝis la 27-a de Julio, *Anne-Marie DUPECHAUD*, *Francine* kaj *Claude LONGUE-ÉPÉE*, *Françoise* kaj *Michel DECHY* partoprenis la 98-an UK-on en Rejkjaviko. Salutante la kongresanojn nome de Esperanto France, *Claude* profitis la okazon por inviti ĉiujn al la 100-a UK

en *Lille*, bela, aktiva kaj gastema urbo. Dum la oficiala programo, ankaŭ mi prezentis antaŭ +/- 200 ĉeestantoj pere de la komputila prezentado farita de *Xavier* por nia nacia kongreso en *Artigues* apud Bordoza, la eblecojn de *Lille* kaj ties regiono. Ni disdonis preskaŭ 1000 flugfoliojn por informi pere de la retejo “*Lille2015*”, tamtami, varbi, inviti... Multaj el la mil partoprenantoj de Rejkjaviko promesis viziti

nin okaze de tiu jubilea UK.

– “Foiro pri Asocioj”: Ĝi okazos la 8-an de Septembro en la vastega sporthalo “*Palacium*” en *Villeneuve d’Ascq*, de la 10-a ĝis la 18-a, bonega momento por reklami kaj varbi! Ek al la venontaj kursoj dum tiu nova lernojarlo por efike prepari “*Lille 2015*”!

Redaktis *Michel DECHY*

El Lille-Villeneuve-Esperanto > METROPOLO

Vizito de Petro *CHRDLE* kaj *Milada BROUMOVÁ*, el Ĉeĥio

Petro unue klarigis, ke en 1992 li fondis kongresan kaj klerigan agentejon *KAVA-PECH* kaj samnoman eldonejon. Li do estas eldonisto de libroj en la ĉeĥa kaj en Esperanto kaj antaŭe organizis kongresojn, konferencojn, seminariojn..., por multaj neesperantistaj mendintoj, sekve ankaŭ por Esperanto-asocioj, ekzemple por AdE, UEA, SAT, ILEI, OSIEK... Krome il organizis ankaŭ proprajn aranĝojn, ekzemple **EKO-TUR, KAEST, InPaSem**.

Danke al la sukceso de tiuj aranĝoj, povice tiuj por neesperantistoj, li precipe komenci eldoni Esperantajn librojn. Li unue deziris eldoni serion da prelegoj, kiuj okazis dum aranĝoj de li organizitaj, sed neniu volis eldoni tiujn verkojn en dezirata malgranda nombro. Fakte, laŭ Petro, eldonado de libroj en Esperanto, pro malgranda merkato, ĉiam estas malprofita kaj oni devas enspezi monon alimaniere. Eldonado estas do kvazaŭ hobio.

Post tiu enkonduko, Petro prezentas al ni kelkajn el “siaj” libroj:

- “*Les bases de l’espéranto d’après le Fundamento*” de *Marc BAVANT*
- “*Ilustrita Frazologio*” de *Sabine FIEDLER* kaj *Pavel RAK* (humuristo)
- Ekoturisma vortaro por piedirantoj kaj biciklantoj
- “*Pavel Rak*”, desegnita humuraĵo kun plurlingvaj tekstoj
- “*R.U.R.*” de *Karel ČAPEK* (en tiu

romano aperas unuafoje la vorto “roboto”).

Kantop por ĝojo, kantaro kun tekstoj, muziknotoj kaj gitaraj akordoj.

Parolante pri entreprenado kaj Esperanto, Petro klarigas, ke povas esti: ĉu Esperanto-firmaoj (ofte temas pri unuopuloj), kiuj favoras Esperanton kiel rimedon (ĉi tie tute ne temas pri Esperanto-asocioj), laborantaj ene de Esperantujo aŭ ekstere, ĉu ne-esperantistaj firmaoj laborantaj ene aŭ ekstere de Esperantujo. Tiu lasta ĝenerale estas la plej bona solvo, ĉar profesiuloj konas la bezonatajn leĝojn kaj havas jam necesajn spertojn. Petro mem iam organizis seminarion por japanaj kuracistoj. Tiuj kuracistoj deziris enporti iun masaĝkremon, kaj Petro faris kontrakton, sed estis problemo kun la dogano ĉar kosmetikaĵojn oni ne rajtas importi en Japanion. La afero finiĝis per granda malprofito... Tiaj malfacilaĵoj emfazas la neceson fonde koni ne nur la leĝojn de sia lando, sed ankaŭ tiujn de la alilanda partnero.

Petro spertis alispesan problemon pro lingva miskompreno. Klientoj, laŭ la mendiloj, ŝajne deziris naĝi en la banloko *Karlovy Vary*, sed tio ne eblis pro purigo de la basenoj. Petro devis elspezi pli por ke ili povu naĝi aliloke, sed finfine tio ne interesis ilin! Temis pri lingva problemo ĉar partnero de Petro konfuzis la terminojn “naĝi” kaj “baniĝi”!

Ankaŭ konsiderendas, ke Esperanto ofte ne estas jure agnoskita lingvo, kvankam oni skribas kontraktojn, doganajn dokumentojn... en Esperanto. Bedaŭrinde, ankaŭ inter esperantistoj estas trompuloj kaj se la tradukisto ne estas jure agnoskita, povas ekesti granda problemo. Estas pli bone trakti en Esperanto sed skribi la kontraktojn kun nekonatuloj en nacia lingvo.



Milada BROUMOVÁ kaj Petr CHRDLE dum promenado en la urbo-centro de Lille

Nuntempe, Petro ne plu havas dungitojn aŭ oficistojn. Li laboras sola, kun neoficiala helpo de *Milada*. Kiam oni eldonas librojn, oni ne forgesu ke la distribuanto devas ricevi rabaton, kaj ankaŭ la librovendisto. Alia malfacilaĵo estas ke la libromerkato malpligrandiĝas sed multaj kostoj samas kioma ajn estas la eldonkvanto. Ofte li plenumas mendon de asocioj aŭ individuoj, kiuj mendas (kaj do pagas) la tutan stokon, ekzemple tiel li produktis La novan PIV kaj PIV 2005 por SAT, aŭ lernolibron de la itala por svedoj, ktp.

Organizado de kongresoj, konferencoj... estis por Petro la plej profitdona agado. La laborlingvo estis kutime naciaj lingvoj, sed Petro ĉiam strebis, ke laŭeble ĉestu ankaŭ esperantistoj, kun kiuj li povis flue paroli en Esperanto kaj tiel levi intereson de samfakuloj. Tiun specon de informado li nomas "infektado de kolegoj per Esperanto".

Petro, fine de la prelego, iom pli parolis pri ekologia turismo, turismo kiu deziras ne nur "melki" la turistojn por enirigi monon en la nacian buĝeton, sed kongruigi turismadon kun protekto de naturo. Li parolis pri Ekotur, ekoturismaj renkontiĝoj en Esperanto, kun la espero ke alia homo daŭrigos tiun agadon – kiun Petro ĉesigis en 2011 – kaj menciis EMA-n (Esperantistan Migradon Aŭtunan), novan aranĝon en Germanio organizitan por piedirantoj.

Sabaton matene, *Claude LONGUE-ÉPÉE*, nia fakulo pri *Lille*, gvidis la tradician mirindan promenadon tra

la malnova urbo, bedaŭrinde sub pluvo (pli da detaloj pri la gvidado de *Claude* troviĝas en la Norda Gazeto numero 421) kaj poste, dum la tuta tago, vigla grupeto da esperantistoj amike kaj ĝoje promenis kaj babilis en internacia etoso (ĉeestis ankaŭ germana esperantisto!).



Mi ĉefe parolis pri Petro, kiu prelegis por ni, ĉar *Milada*, la amikino de Petro, tiel ke ne estis ĉiam facile komuniki kun ŝi. Helpate de Petro, ŝi tamen rakontis ke, eklerninte Esperanton iom hazarde, ŝi enamiĝis al Petro, sia instruisto! Do nun Esperanto fariĝis deviga studobjekto por ŝi.




Claude prezentas al Petr kaj Milada la plej gravajn interesojn de Lille. :-)


Mia edzo, kiu ankaŭ spertas tiun "devigecon" de Esperanto, facile povis kompreni, kion ŝi travivis dum la prelegvojaĝo... Bedaŭrinde, pro manko de flueco en la komuna lingvo, la du kompatinduloj ne facile povis kune plendi (espereble nur plendeti!) pri siaj esperantistaj viv-partneroj!


Reportis *Katja BOEN*
(helpita de Petro *CHRDLÉ*)

El Valencieno

Agad-raporto el Valencieno

 **La 20-an de Aprilo**, okazis la inaŭguro de la strato "*Ludwick L. ZAMENHOF*" en *Beuvrages*, apud *Valenciennes*. Ĉeestis proksimume 50 gesamideanoj.

 **La 2-an kaj 22-an de Septembro**, nia grupo partoprenos en la Foiro de la Asocioj, kiu okazos en Salono *Vauban*, strato *Magalotti* en *Valenciennes*.

 **La 3-an de Oktobro** rekomenciĝos la kursoj de Esperanto en la Domo de la Asocioj de *Valenciennes* por la 1-a grado; kaj la 5-an de Oktobro por la 2-a grado.

Raportas *Jean-Marc FRATARD*

El Valencieno

Lucien JONAS

Li naskiĝis en *Anzin* la 8-an de Aprilo 1880. Liaj gepatroj estis parfumbabrikistoj. Ilia loĝejo situis sur la nuna avenuo *Anatole FRANCE*, apud la muzeo de la karbominejo. Li estis liceano en *Valenciennes*. Dum sia studado, li havis multe da sukceso ĉe siaj kamaradoj, desegnante la kapon de la profesoroj. Sed en lia nask-

iĝurbo oni tiam nombris 1 500 ministojn, li do havis la okazon bildigi en sia nedisigebla kajereto la tipajn visaĝojn de tiuj laboristoj. La ministra lando ĉiam lasos al li la spurojn de tiu kajereto.

Li poste vizitadis la kursojn de la pentristo *LAYRAUD* en la Akademio

de *Valenciennes*. Lia majstro sendis lin en Parizon. Li prezentigis en la ateliero de *Majstro BONNAT*, sed la akcepto estis sufiĉe malvarma, ĉar *BONNAT* sentis jaluzon kontraŭ *LAYRAUD*. *Lucien JONAS* devis suferi la tedadon de la purigado de la penikoj kaj de la preparado de la koloroj. Sed li pentris "*Les Conso-*

lations" (La konsolojn) kaj Majstro **BONNAT** agnoskis lian artecon.

En 1906, **JONAS** akiris la Rom-premion. La 29-an de Julio, la urbo akceptis lin kaj la municipa muzikistaro prezentis al li koncerton. En 1907 li gajnis medalon koncerne al "Les Marguilliers" (paroĥadministrantaro) (muzeo de *Cambrai*).

Li daŭrigis sian verkon per primoraj scenoj kiaj "Les Rouffions" (La fid-enucistoj), kiu akirigis al li la oran medalon en la Salono de 1907 (tiu pentraĵo estis aĉetita de **CHULALONGKORN**, reĝo de Siamo, por lia palaco de *Bangkok*); kaj kiaj "Les Magistrats" (La Magistrataroj) en 1909 (muzeo de *Douai*), kaj kiaj "Les Tyrans" (La Tiranoj). Kun "La Consultation" (La Konsulto) li akiris la Nacian Premion en 1911.

Li ankaŭ eminentis kiel portretisto, pentrante la eminentulojn de la epoko: **François PONCET**, la Doktoron **ROUX**, la Kardinalon **LIENARD**, la Marŝalojn **FOCH** kaj **FRENCH**, la Generalon **PERSHING** kaj multajn aliajn superajn oficiojn, la artistojn de la Franca Komedio (*Comédie Française*), multajn prelaojn. Sed li ne forgesis la simplulojn: estis de li pentritaj soldatoj, ministoj, karbo-partigistinoj (*caffus*), metalurgiistoj.

Li estis la aŭtoro de multaj desegnaĵoj aperintaj en la semajna gazeto "L'illustration" (La Ilustrajo) kaj li estis maketisto por la Franca Banko.

Li desegnis la Bileton de 10 F. Multaj libroj, tiuj de **Jules MOUSSERON** aparte, estis de li ilustritaj. Li ankaŭ pentris freskojn por vivigi festosalonojn, teatrojn, preĝejojn. En *Anzin*, oni povas daŭre admiri liajn verkojn en la urbodomo, la preĝejo, la apoteko. Estas priplorinde, ke muraj pentraĵoj



ornamentaj kafejoj de la placo malaperis sekve al la transformado de tiu ĉi en Bankan Establon.

En 1930, **JONAS** estis nomumita Kavaliro de la Honora Legio. En 1935, li akiris Argenton Medalon pri gravurado, kaj sekvantajre, li estis nomumita juriano de la Salono.

La pentraĵo "Fureur teutonnie" (Teŭtona Furiozo) estis rekompencita en 1945 per Honora Medalo pri pentrarto. En 1947, li estis nomumita laŭreato de la Instituto kun la premio **DAGNAN-BOUVERET**. Sed, la 20-an de Septembro, li formortis.

Liaj verkoj estas ekspoziciitaj en *Petit Palais* (Eta Palaco), en la Armea Muzeo, en la muzeo de la Honora Legio kaj en multe da francaj kaj alilandaj urboj: *Versailles*, *Lille*, *Douai*, *Cambrai*, *Valenciennes*, *New-York*, *Philadelphie* kaj *Montréal*.

La Muzeo de la Karbminejo en *Anzin* prezentas plurajn el liaj verkoj: "Les Syndicalistes" (La Sindikatistoj), "La Lessive" (La Lesivo), kaj liaj portretoj de ministoj, karboapartigistinoj, laboristoj.

Plato estis metita sur la fasadon de lia naskiĝa domo, kaj lia bronza busto, ombrumata de saliko, staras apud la preĝejo, sur la strato de la Martirioj.

Eltraĵo de la libro de S-ro **Jean-Claude MOUYS**: "Histoire d'Anzin" tradukis **Jean DIETRICH**

Granda vojaĝo

Raporto pri Brazilo (dua parto)

Recifo kaj *Olinda*

Ili estas du malnovaj urboj portugalstilaj situantaj sur la nord-orienta marbordo.

Dum nia tiea restado, nia hotelo estis ne tre bona: tro malgranda, tro brua kaj ne komforta.

Feliĉe, ĉar la temperaturo estis tre alta, estis klimatizilo, kiu bone funkciis.

En *Olinda*, ni multe promenadis. La



ENHAVO

NIAJ MEMBROJ VERKANTAS

- ★ Raporto pri Brazilo (2-a parto) p11
- ★ Lu nordfederaciano en UEA-kongreso de Rejkjaviko p14
- ★ Amikeco kun mia simiino "Noâra" p18
- ★ Pri "L'Écume des jours" (La ŝaŭmo de l' tagoj) de **Boris VIAN** p20
- ★ La telerbretaro (2-a parto) p22
- ★ Atentigo de la redaktoro p24

malgrandaj domoj gluitaj unuj ĉe la aliaj estas tre kolorriĉaj. Ni vizitis monaĥejojn kaj preĝejojn konstruitajn laŭ baroka portugala stilo.



Ekstere, ili estas blanke farbitaj kun la fasadkonturoj borderitaj de ornamaj orajoj.

La lumo belege lumigas tiujn fasadojn.

Necesas regule prizorgi la eksteron de la preĝejoj ĉar, pro la varmo kaj la klimata malseko, la muroj ŝimas kaj nigriĝas.

Tiu difekto lasas impreson pri kadukeco, pri putrado elvokanta finigon kaj eĉ morton.

Interne, la ora baroka stilo estas tiel ŝarĝita, ke la horejoj kelkfoje similas al grandegaj kremkukoj.

En *Olinda*, tie same kiel ĉie, vespere, sur la larĝaj terasoj antaŭ la trinkejoj, muzikaj grupoj alvenas kaj muzikas ĝisnokte.



En la tago de la Festo de Ĉiuj Sanktuloj, ni iris ĝis Recife (nur kelkajn kilometrojn for de *Olinda*).

Neniu en la urbo, ĉiuj vendejoj estis fermitaj.

La morgaŭon ni reiris kaj ni malkovris tute alian etoson.

Granda bazaro okupis la placojn kaj la trotuarojn. Laŭlonge de la stratoj, eĉ sur la tegmentoj kaj sur la veturilaj tolsirmiloj, la vendistoj instalas siajn varojn.

Estis malfacile imagi, ke ni estas

en la sama urbo kiel dum la antaŭtago.

Apud Recife, ni deziris viziti la Muzeon de *Francisko BRENNAN*, tre fame konata Brazilia ceramikisto.



Por atingi tiun lokon, la afero estis sufiĉe malfacila.

Ni veturis kiel kutime pro la busoj kaj tio, en Brazilo, estas vera aventuro. Ne estas busliniaj mapoj. Nur la bushaltejoj ni atingis facile. Poste, por elekti la taŭgajn buson kaj direkton, ni devis demandi. Sed ni ne parolis la landan lingvon kaj neniu parolas la anglan (kompreneble ankoraŭ malpli Esperanton).

Feliĉe la Brazilanoj estas tre servemaj kaj helpemaj. Krome, nia grupo de kvin maljunaj perdiĝintaj gefrancoj amuzis ilin. Certe ili mokis nin, sed de amika maniero. Ĉiu provis helpi nin. Ofte, ŝajnis, ke ili ne interkonsentis. Ĉiuj parolis kaj ni kreis en la buso ridan etoson.

Tiun ĉi fojon, la busstiristo parolis kun la pasaĝeroj: li petis ion al ili.

Fakte, por ke ni povu atingi la muzeon, ĉiuj pasaĝeroj konsentis, ke oni haltigu la buson kaj atendu, dum la stiristo kaj la kontrolisto serĉas kaj trovas por ni du taksiojn por konduki nin ĝis la muzeo.

Denove, multajn dankojn al ĉiuj!

Muzeo Francisko BRENNAN

Ĝi estas tre granda muzeo situanta en granda natura parko en la ĉirkaŭaĵo de Recife.

Sur la loko estis antaŭe iu familia brikfabrika.

Nun estas giganta ekspocia loko, kie oni povas vidi milojn da ceramikaj verkoj de *Francisko BRENNAN*, nur de li.

Nia grupo konsistis el kvin personoj. Niaj impresoj, fronte al la ekspocio de *Francisko BRENNAN* estis diversaj, dubsentaj kaj eĉ kontraŭdiraj. Estas malfacile resumi.



Do, ĉiu el ni donis nur kelkajn vortojn, kiuj esprimas la sentojn post la vizito. Per tiuj vortoj, ni faris frazojn.


Jen la teksto, kiu naskiĝis. Ĝi tradukas la kompleksecon de niaj impresoj:

Ni estas dronigitaj, impresitaj pro tiu giganta produkto. Tiu primitiva, obseda kaj seksa mensa mondo senaplombigas nin. El la materialoj kaj formoj rezultas belaj ceramikajoj. Sed, malgraŭ la beleco, la troa pleno de verkoj iĝas naŭza. La fiverkoj de F.B. Elmontras virviran kaj megalomanian artiston. Virbovo kiel Picasso

Salvador de Bahia



En *Salvador de Bahia* ni luprenis apartamenton en la kvartalo *Rio Velmejo*. Nia loĝejo estis granda, agrabla, lumplena, bone situanta, kaj de la alta teraso ni havis belan vidon super la urbo. Krome, estis naĝejo por malvarmetigi nin. Per buso ni iris ĝis la plej bela kaj plej pura strando de la regiono: *Itapua*. Tie ni restis la tutan tagon, sub la ombro de la arboj. Ni banis nin en varmeta akvo. Ni promenadis laŭlonge de la strando, grimpis sur la ŝtonegojn, admirante la maron, la lumturon, la fiŝkaptadon kaj la popolon. Ŝajnas, ke la Brazilanoj estas tre komfortaj kaj senĝenaj en sia korpo kaj sia kapo. Plie, la maniero sin vesti valorigas iliajn korpajn rondajojn.



Je la sepa, jam estis nokto. Ni reiris al nia apartamento kaj *Gérard* preparis por ni bongustan aperitivon, Brazilan specialaĵon: "*Caipirinha*" (suko de verda citrono, sukero, rumo kaj glacieroj). Poste ni iris ĝis la centra placo de la kvartalo, kie ekstere okazas muzikaj festoj. Tie, kiel en la aliaj kvartaloj, la homoj kunvenas por

babili, drinki, manĝi kaj aŭskulti brunan muzikon. Sur tiu placo de *Rio Velmejo*, ni manĝis specialaĵon de la urbo "*Acarajes*": frititaj kukoj el fazeolfaruno, farĉitaj per salikokoj. Ili estis servitaj de virinoj, blanke vestitaj, laŭ la modo de la antikvaj Bahiaj virinoj. Kiel kutime dum nia vojaĝo, ni drinkis plurajn refreŝigajn bierojn, unu el la preferitaj trinkaĵoj de la Brazilanoj.

La Insulo Itaparika



Ĝi situas proksime de *Salvador de Bahia* (je duonhoro per ŝipo). Per malgranda kaj malnova buso, ni traveturis la insulon. Niuflanke estis malgrandaj domoj kaj multe da rubaĵoj kaj plastajoj; aliflanke estis grandaj kaj riĉaj domegoj ĉirkaŭataj de bariloj; gardistoj prigardas la pordojn de ties enirejoj. Tiuj du aspektoj de la insulo – riĉeco kaj malriĉeco – spegulas la bildon de la tuta lando. Laŭlonge de la maro ni promenadis, sed la multaj algoj, kiuj invadas la strandon, ne instigis nin al banado.

Rio-de-Ĵaneiro

Lasta restadloko de nia vojaĝo. Ni estis rezervintaj hotelon en la kvartalo "*Copacabana*" (Kopakabana), mita strando de *Rio*, fame konata en la tuta mondo. *Copacabana* estas unu el la multaj strandoj, kiuj desegnas grandajn arkojn laŭlonge de la vastega golfo de *Rio*: pluraj kilometroj da fajna sablo, regule purigitaj kaj ebenigitaj. Ni imagis vidi sur la strando, ĉar ofte bildigitajn, belegajn virinojn, duone vestitajn, sed la vetero estis ne tre

bela kaj estis do preskaŭ neniu sur la plaĝoj. Larĝa trotuaro laŭiras la strandon. Ĝi estas ornamita de grandaj, nigraj, arabeskaj ondoj en ceramiko. Tiu ornama motivo troviĝas sur la teksaĵoj de la sakoj kaj spongotukoj venditaj en *Rio*.

Porbicikla vojo laŭiras la trotuaron: iuj biciklas, iuj kuras, iuj rulsketas. En *Rio*, oni prizogas sian korpon. En tiu urbo, la virinaj pugoĵoj kaj la viraj ventroj estas pli maldikaj ol en la cetero de la tuta lando. Vespere, je la sepa, kiam noktiĝas, la strando elektre lumigita iĝas sportludejo. La bulvaroj laŭiras la porbiciklan vojon. La trafiko estas densega kiel en ĉiuj grandaj urboj. Aliflanke de tiu bulvarado estas la grandega urbo kun siaj multetaĝaj konstruaĵoj kaj inter ili kelkaj ladurboj (favelas). En ĝi, ni ne iris, ĉar estas nepre necese esti akompanata. Ni iris ĝis "*Corcovado*" (Korkovado), alta loko kie staras grandega statuo de Kristo kiu, kun horizontalaj brakoj, majeste superas la urbon kaj la golfon.





Malgraŭ la griza vetero kaj la nesufiĉa sunlumo, estis impresa vido sur la maro kaj la klifegoj, (ĉefe la Suker-Konuso). La fotoj kaj filmoj ne tradukas la realan impreson de tiu grandioza spektaklo.



Ni vizitis la modernan Katedralon. Ekstere estas piramido el betonaj

alveoloj. Interne, du arkaĵoj de vitraloj, sekvantaj la formon de la piramido, alte kruciĝas kaj lumigas la lokon.

Ni promenadis sur la sambodromo, loko kie okazas la paradmarŝo dum la fama karnavalo de *Rio*.

Ĝi estas speciale larĝa strato, 750 metrojn longa, konstruita por tiu manifestacio.

Ambaŭflanke de la strato estis starigitaj pluraj etaĝoj da sidstupoj, kie eblas rezervi lokon por bone profiti la spektaklon.

Pere de filmoj de antaŭaj festoj, kiujn ni vidis el DVD-oj, ni povis imagi la deliran etoson de tiu festo, grava momento por multaj Brazilanoj, preparita dum la tuta jaro.

En vendejo, ni admiris la riĉecon kaj diversecon de la ekstravagancaj kostumoj.

Eĉ se, dirante la vorton "karnavalo", oni pensas pri *Rio*, la karnavalo ekzistas en ĉiuj grandaj urboj de Brazilo.

Ĉiu urbo havas siajn proprajn karakterizaĵojn kaj kostumojn.

Tie, en tiu mita urbo, nia vojaĝo finiĝis.

Ni ree enaviadiliĝis en la vespero kaj alvenis la morgaŭan matenon en la griza kaj freŝa vetero de Parizo.

Sed...

Denove pere de Esperanto prepariĝas ankaŭ alia vojaĝo, ĉifoje al Litovio.

Ni ja partoprenos la Esperantan renkontiĝon de la baltaj landoj, kiu okazos en la venonta somero.

Audra, Esperanta amikino, atendos nin en Vilno, estos nia Esperanta gvidantino kaj akompanos nin ĝis Peterburgo.

Mikaelo Bronŝtejn (rusa esperantisto, kiu vizitis nin en *Amiens* antaŭ kelkaj semajnoj) rezervas por ni hotelon en Peterburgo.

Eble, aliaj Esperanto-renkontiĝoj ebligos aliajn venontajn vojaĝojn.

Verkis **Bernadette MANIER**
kaj **Thérèse-Marie FRENOY**
de la Amiena Esperanta Grupo

La Universala Kongreso de UEA en 2013 lu nordfederaciano en UEA-kongreso de Rejkjaviko

Restado en Islando de la 13-a de Julio ĝis la 27-a de Julio

Mi partoprenis, kun mia edzino, en la 98-a Universala Kongreso de Rejkjaviko. Kaj ni gratulas al ties organizantoj pro ties agnoskita sukceso kaj pro la interesaj debatitaj temoj. Ni ekskursis en Islando kun la karavano organizita de *Espéranto-France*; kaj ni dankas al *Susanna*, kiu kun la vojaĝagentejo baraktis por tion bone organizi, inkluzive de la solvado de malfacila problemo de loĝebleco (!).

Mi revenis hejmen post dusemajna restado en Islando kun kvincento da fotoj faritaj de mia edzino. Mi revenis hejmen ankaŭ kun du pluŝaĵoj de fraterkuloj (ankaŭ nomitaj "marpapagoj" aŭ "pulĉineloj de l'maro", belaj birdoj kun mallonga dika kolora beko loĝantaj en teraj

kavaĵoj). Mi revenis hejmen ankaŭ kun, por donaci al mia filino kaj al mia bofilino, amuzaj miniaturaj statuetoj de Islandaj gnomoj. Mi revenis hejmen ankaŭ kun, por donaci al junaj amikinoj, kolĉenon kun unu nigra ŝtoneto el lafo.

Mi revenis hejmen ankaŭ kun multaj memoraraĵoj en la kapo kaj en la koro. Pri la vojaĝo de la karavano de *Espéranto-France* en la Islanda insulo; kaj pri la afablaj kaj interesaj kontaktoj ligitaj kun ĉiuj samkaravananoj. Pri la mirindaj esceptaj pejzaĝoj viditaj sub ĉielo ĉiam kaj subite ŝanĝiĝanta, sub pluvo (malofta), aŭ sub nebulo (kelkfoje netravidebla), aŭ sub bela sunplena ĉielo. Pri la kunvenoj, debatoj kaj prelegoj

proponitaj de la organizantoj en oportunaj salonoj de taŭga vasta kongresejo.



Nia karavano konsistis el 24 gesamideanoj. Ni, kun preskaŭ ĉiuj, jam havis okazon konatiĝi okaze de antaŭaj kongresoj aŭ kunvenoj. Ni ne tro ofte krokodilis. Inter ni nia plej juna kunulo estis *Gabriel*, proksimume dek-unu-jara, tre afabla kaj

babilema kaj diable sinhelpema. Inter ni estis du maljunuloj, *Roland* kaj mi mem. Ĉiukaze la ĝenerala etoso estis gaja, komunikema... kaj finfine juneca!...

Dum la karavana vojaĝo, niaj ekskursoj estis gvidataj de iu juna ĉiĉeronino (dum unu tago) kaj de iu ĉiĉerono (dum la tuta cetero de la semajno). Ambaŭ ili estas bonaj regantoj de la franca kaj kompetentuloj. Dum la kongreso, ni partopenis du ekskursojn. Ambaŭ ili estis gvidataj de unu loka pli malpli profesia gvidisto, kun unu esperantisto bone reganta la lingvon por traduki. Tiu sistemo estas miaopinie bona solvo, kiu devos inspiri nin okaze de la UK en Lille en 2015.

Mi volus provi priskribi la pejzaĝojn de ni vizititajn. Ili vere impresis min – kaj certe ĉiujn ne-Islandanajn vizitantojn – pro sia escepte grandioza natura beleco, kaj pro sia granda varieco, laŭ tamen konstanta homogeneco.

Tiu "homogena varieco" estas stampita: de nigraj, brunaj, grizaj orgenformaj klifoj; de supermaraj rifoj, de lafaj horizontalaj faldoj, ŝtonoj, gruzoj kaj sabloj.

Ĝi estas stampita de verdaj montoj: kun herboj; kun likenoj; kun tre maloftaj malgrandaj arbetoj; kun modestaj koloraj florbedetoj.

Ĝi estas stampita de akvo: akvo de la maro, ŝajne kvietaj sed kelkfoje perfida; akvo de vulkanaj krateraj lagoj kaj lagegoj; akvo de impetegaj torentegoj kaj de kvietaj riveretoj; akvo de akvofaloj kaj kataraktoj; akvo de gejseroj kaj de varmaj fontoj; akvo de glaciejoj.



Ĝi estas stampita de – ĝenerale blankaj sed kelkfoje diverskoloraj – domoj, farmobienoj kaj preĝejoj, dissituantaj izole aŭ en tre malgrandaj vilaĝetoj.

Ĝi estas stampita de ĉevalaroj kaj ŝafaroj, meze de kiuj moviĝas malmultaj bovinoj.



Mi ja volus priskribi detale ĉion tion. Sed – kiel mi jam klarigis – mi skribas nenian noton dum miaj turismaj vojaĝoj kaj mi povas paroli nur pri la impresoj; kiuj frapis mian menson kaj mian memorkapablon. Krome mi povas rigardi mapojn; sed mi kapablas nek legi, nek memori, nek diri, nek ortografi la nomojn Islandajn de la vizititaj lokoj – escepte kompreneble de kelkaj tre mallongaj aŭ ofte ripet-

ataj lokoj tiaj, kiaj *Vik*, *Rejkjavik* aŭ *Keflavik*.

Mi iom parolu pri la manĝomodoj kaj pri la manĝaĵoj de la Islandanoj. Sed mi ne estas sufiĉe kompetenta pri gastronomio. Mi nur diru, ke ni preskaŭ ĉiam manĝis supojn – cetero tre bongustajn – kaj pladojn kun fiŝaĵoj – sed tamen ankaŭ kelkfoje kun viando de boaco aŭ de ŝafido – kaj kun banalaj legomoj – el kiuj la terpomoj estas maldikaj kaj ne senŝeligitaj. Ni profitis desertojn el kremo aŭ blanka fromaĝo kun fruktoj. La normala trinkaĵo estas akvo aŭ eventuale biero, kaj kafo por fini la manĝojn.

Dum la kongreso ni vespermanĝis en restoracioj por frandi lokajn pladojn... Kaj ĝenerale ni glutis picojn aŭ pastaĵojn, kun glaso da franca ruĝa vino!...

Dum la ekskursoj organizitaj kadre de nia karavano kaj de la kongreso, ni faris plurajn interesajn kaj ofte sportajn piedmarŝojn sur multaj interesaj situoj.

Ni ne vidis vulkanajn erupciojn, sed ni vizitis multajn spurojn de erupcioj, kiuj fakte estas ege oftaj kaj konsistigas la tutan insulon.

Ni vidis ĉe la belaj klifaj kaj rifaj marbordoj multajn krietajn mevojn el iliaj nestoj kaj marpapagoj el iliaj teraj kavaĵoj. Ni vidis ankaŭ la strandon, sur kiu elŝipiĝis la britaj soldatoj dum la dua mondmilito.



Ni vizitis la grandan fendegon, kiu moviĝas inter la Eŭropazia kaj la Amerika kontinentoj, trairante Islandon. Tie ni vidis la lokon, kie kunvenis regule, ekde la komencigo de la deka jarcento, ĉirkaŭ trideko da estroj de la insulo, por pridebati kaj difini la



leĝojn de la lando; kaj ĝiajn religiojn, kiuj estis sinsekve paganisma, katolika kaj nun Luterana.

Ni havis la okazon krozadi en malgranda ŝipo sur lago kun multaj flosantaj glaciinsuloj. Ili havas variajn kolorojn el blanko, bluo de aero kaj diversaj gasoj kaj nigro de ricevitaj erupciaj polvoj. Mi tiel eksciis, ke pro malsimila rapido de fandiĝo en la suba akvo kaj en la supera aero, tiuj glaciinsuloj kelkfoje renversiĝas, kio kreas grandan danĝeron.



Laŭ padoj krutaj kaj abruptaj ŝtupoj ni esploris plurajn kaskadojn, de supre, de malsupre, de flanke... kaj eĉ unufoje de malantaŭ la akvofalo. Ni admiris gejserojn, kies internacia vorto devenas de la Islanda loko "Geyzir". Tie ŝprucas regule kaj bruege dum pli malpli mallonga tempo altaj kolonoj de akvo. Ni same vidis multajn varmajn fontojn, kies situo videblas de malproksime pere de nubo de vaporo.



Cetere tiu subtera varma akvo liveras sian entenan energion al la tuta insulo.

Ĝi varmigas – per termikaj interŝanĝiloj – krudan akvon, kiu estas distribuata per dikaj varmizolitaj tuboj por konsumado kaj hejtado de ĉiuj loĝejoj.

Ĝia kaloria energio estas transformata en elektra centraloj, kiuj provizas la tutan insulon per elektra energio.

Ni vizitis tian centralon, kiu ĉerpas akvon je 250/300°C per subtera borado ĝis profundo je 3000 m. La turbinoj prilaborantaj la malalttemperaturan vaporon estas kompreneble gigantaj, dum la alternatoroj de ili movataj ŝajnas liliputaj.

Tiun varman akvon ni trovis ankaŭ ĉe naturaj naĝejoj, kies temperaturo proksimumas je 38°C, kaj en kiuj ni povis ripozi, padeli kaj naĝi. Aparte fama estas "La Blua Laguno" ne malproksime de Rejkjaviko.

La karavano vizitis ankaŭ fiŝkapejon, en kiu ni vidis sekigejon de ŝarkfileoj, kiujn ni povis gustumi. Samloke ni povis admiri gigantajn vertebrojn kaj ripojn de balenoj.

La karavano vizitis ankaŭ muzeojn. En unu el ili ĝia kreinto akceptis nin, montrante multajn objektojn, skribaĵojn, desegnaĵojn de la Islanda vivo kaj historio, kaj muzikante per diversaj muzikiloj.

En alia ni spektis diversajn scenojn de la legendoj kaj de la historio de Islando.

Dum la kongreso kompreneble ne eblas ĉeesti ĉiujn kunvenojn, prelegojn, manifestaciojn.

Mi partoprenis la "Movadan Foiron" de la sabata vespero. Mi kompreneble ĉeestis la dimanĉan kongresan inaŭguron, kaj ankaŭ la solenan fermon. Mi aŭskultis tri prelegojn de

la "Kleriga Lundo". Mi ĉeestis ses el la ok prelegoj de la "Internacia Kongresa Universitato". Mi ĉeestis la sinprezentadon de la nova estraro de UEA. Mi ĉeestis la kunvenon kun la akademianoj de Esperanto kaj la prelegojn de la "Esperantologia Konferenco". Mi ankaŭ spektis la "Nacian Vesperon" kaj la "Internacian Artan Vesperon".



Dum la Movada Foiro, **Didier LOISON** estrarano de *Espéranto-France*, **Michel DECHY** prezidanto de la Nordfrancia Esperanto-federacio, kaj mi mem deĵoris ĉe la budo de *Espéranto-France* kaj de "Lille2015". Ni disdonis kelkcentojn da flugfolioj pri "Lille 2015", prikantante la meritojn de Lille kaj de ĝia regiono.

Mi ankaŭ havis la privilegion, dum la inaŭguraj salutoj, esprimi la salutojn de *Espéranto-France*. Mi samtempe invitis al la centa Universala Kongreso en Lille, prikantante la meritojn historiajn, arkitekturajn kaj kulturajn de nia urbo.

Siaflanke **Michel DECHY** prezentis bildojn kaj filmojn pri "Lille2015", okaze de kunveno kun reprezentantoj de Bona Aero pri la kongreso de 2014.

Ni ofte dum la kongreso estis demanditaj pri nia regiono kaj nia

kongreso, kiu ŝajne interesas multajn samideanojn.

Kiel kutime la dek-kvin prelegoj de la "Kleriga Lundo" venigis multajn pri-interesatojn.

Mi aparte taksis la prezenton de **HORI Jasuo**, pri utiligado – kaj reklamado – de Esperanto; kaj lian el-montron de muzikiloj pli strangaj unuj ol la aliaj.

Min same interesis la prezento de **Claude NOURMONT** kaj de **Mireille GROSJEAN** pri la "Grundtvig-Projekto" subvenciita de Eŭropa Unio.

Mi aŭskultis kun granda intereso la prelegantojn de la Kongresa Universitato: pri Esperanto kaj la "Nov-Norvega lingvo"; pri la problemoj de Esperanto fronte al ĝia komunikado inter multaj malsamaj kulturoj; pri la komparo de evoluo inter la lingvoj kaj la biologiaj specioj. Kadre de tiuj prelegoj mi ankaŭ multe lernis okaze de la raportoj, kiujn mi ŝatis: pri la violono, kvankam mia malkompetento pri la muzikaj reguloj igis min ofte miskomprenanta la klarigojn de la preleganto; pri la fenomeno de la Skandinava krim-romano; pri la du sortoj de la Romia imperio; pri la Galapagoj kaj la historio de la evoluo-biologio de **DARWIN**.

Male; ĉeestinte nur unu el la tri prelegoj pri la "Historio de Esperanto", mi emus riproĉi al la preleganto tro rapidan kaj tro unutonan paroladon, kio certe malfaciligis la komprenon de la aŭskultantoj, ĉu duonsurdaj kiel mi, ĉu

komencantaj la praktikon de la lingvo.

La debatoj pri la kongresa temo venigis bedaŭrinde malmultajn partoprenantojn.

Ili pritraktis la temon pri "Insuloj sen izoliĝo: por justa komunikado inter lingvokomunumoj". Niaj diskutoj inspiris la rezolucion alprenitan dum la ferma kunveno de la kongreso.

Tiu rezolucio esprimas la kvalitojn de Esperanto por faciligi la komunikadon kaj la malfermon de la "Insuloj" maraj, lingvaj, politikaj, sociaj, el ilia izoliteco, al la aliaj homaj kategorioj. El niaj diskutoj montriĝas la evidentaj meritoj de Interreto por disvastigi Esperanton danke al diversaj retejoj tiaj, kiaj "lernu" aŭ "edukado-net". Sed ni ankaŭ atentigis pri iela malvirto de Interreto, kiu igas la novajn esperantistojn izoliĝi antaŭ siaj komputiloj, ne serĉante la fizikajn kontaktojn de kunvenoj kaj de vivantaj interkomunikadoj kaj debatoj.

Mi bone taksis la sinprezenton de la novaj estraranoj de **UEA**. Kaj aparte tiun de la nova prezidanto **Mark FETTES** el Kanado. Li ŝajnas tre komunikema kaj plena de vigla entuziasmo al multaj celoj kaj projektoj.

La akamemianoj (17 ĉeestantoj el la 45 membroj de la akademio) sperte respondis al la prilingvaj demandoj starigitaj al ili de pluraj ĉeestantoj de la publika kunveno de la akademio: Ĉu la normalan uzadon de "poŝtelefono" povas anstataŭi "portebila telefono" aŭ "komputfona"?

Ĉu ni diru "eblo" aŭ "ebleco"?

Ĉu ni diru "je kioma horo" aŭ "je la kioma horo"?
Ktp. ktp.!!

Dum la distraj vesperoj mi ŝatis ĉiujn prezentojn de la "Nacia Vespero": la spadlukton de vikingoj; la korpolutojn de modernaj luktantoj; la teatran spektakleton (en Esperanto!); la bele kantantan koruson; la junan muzikistaron.

Same mi ŝatis la "Internacian Vesperon" kaj ĝiajn vere talentajn aktorojn; kun aparte la internacian koruson, malgraŭ ĝiaj nemultaj provludoj.

Mi ŝatis kaj bone taksis la iniciaton de la estraranoj, je la fino de la kongreso,



saluti ĉiujn gekongresanojn per manpremo sur la granda ŝtuparo de la kongresejo.

Kaj jen ni revenis en nian vilaĝon, kun granda provizo de interesajoj kaj kun decido de plena strebo por Esperanto.

Redaktis **Claude LONGUE-ÉPÉE**
(KN 232) Aŭgusto 2013



AMIKECO KUN MIA SIMIINO "NOĀRA"

Ni estas komence de la 20-a jarcento, *Elian-J. FINBERT*, franca judo vivanta kun sia familio en malgranda urbo de malalta-Egiptio, iam renkontis migrantan amuziston kiu promeniĝis simiino, kaj kiu vendis ĝin al li. Tiu simiino, nomita *Noĉara* akompanis lian vivon dum dukdo da jaroj. 40 jarojn poste li verkis plenan libron ("*Noĉara* amata mia" - 1962) - Ĉu pri ĝi? Ne! Pri ŝi!

Ĝi estas tre interesa libro, rilatante la intelektajn kapablojn de simioj; ĝi estas ankaŭ tre kortuŝa libro. Jen kelkaj eltirajoj.

Roland PLATTEAU

Noĉara kaj muziko

Obsedata ŝi estis de la fortepiano en la salono. Ekde kiam mia patrino malfermis ĝin, sur ĝi ŝi ekestis, atentema kun sia mallaborema gracio, kaj kvazaŭ respektplena atendante, ke efikos la eĥo de la miraklo de la kordoj.

Sed, ĉefe kiam mia patrino sidigis sur la turnebalan taburetton kaj movis siajn manojn sur la blank-kaj-nigra klavaro, la simiino, saltante sur ŝian ŝultron, kun unu brako lokita ĉirkaŭ ŝia kolo, ekĝvatadis al la vastaj harmoniondoj, kiuj estis elkateniĝontaj. Senmovadis ŝi, dum kuradis ŝiaj okuloj, sekvante la sinsekvon de la notoj eliĝantaj el la klavoj, kaj ellasantaj sian sorĉadon laŭ nekredbla rapidegeco.

Ofte, por plezurigi niajn longajn tagfinojn kaj plenigi la malplenon de nia izoliteco, perditaj kiaj ni estis funde de tiu vilaĝejo de malalta Egiptio, en tiu loĝejo, kiun nokto invadadis igante eĉ pli vasta tiun duetaĝan hejmon, ni ĉirkaŭ la piano kunpremiĝis, kaj kune kantis jen malnovajn kanzonojn jen "*lidojn de Ŝuberto*", kiujn nia patrino akompanis, kaj kiuj torento elflugis tra la malfermitaj fenestroj, vekante la surterase kuŝantajn familiojn de fellahoj kaj la surkornicajn kolombojn, kies kveroj aŭdiĝis al ni. Tiam *Noĉara* troviĝis en plejalto de kvieta ĝuado, kiu ne pelis ŝin ekster ŝi, sed animis ŝin en sento pli klara, pli konscia, ke ŝi estas meze de ĉiuj anoj de l' familio, kun kiu ŝi sentis sin kunligata pere de ligoj tre profundaj, kaj kiuj estis ŝin adoptintaj kiel personon, kiel alian etfratinon,

igintan la fokuson de nia intereso, de niaj amuzoj kaj de niaj zorgoj. Kaj, celante esprimi sian dankemon pro tio, kion konsistigis al ŝi tiuj muzikaj seancoj, ŝi delasis sian gvatsidejon sur la ŝultraj de mia patrino, ŝi dumane aplaŭdis kiel infanoj faras, kaj poste ŝi saltegis de kantisto al alia, kun pepadoj, kun ŝoviĝa tenereco, kvazaŭ ŝi plenumus ian aeron baleton, ridetante al ni, kaj nin ŝajne kuraĝigante.

Nur multe pli malfrue mi kaŝe eksciis la sekreto de tio, kion de tiam por mi sola mi nomis "la muziko, kiu plorigas". Tiu sekreto estis dividita jam de longe inter mia patrino kaj *Noĉara*, kaj poste inter ni tri. La muziko donis al la vivo de mia patrino ĝian veran dimension. Ĝi estis ŝia ĉiutaga spiro, kiel sur alterteno. Je iu ajna horo en la tago, abrupte ŝi forlasis siajn mastrumajn truditaĵojn, flankenjetis la antaŭtukon, iris lavi siajn manojn, pudris sin, kaj rifuĝiris en la salonon, kie ŝi ludadis iun "Nokturnon de Ŝopeno". La muziko estis al ŝi la ĉiama ĝuofonto, la konstruo al ŝia sekreta feliĉo, ŝia feliĉega patrujo. Neniu inter ni aŭdacus, tiamomente veni ŝin aŭskulti, en tiun ampleksan ĉambron kun ĉiuj kuntiritaj kurtenoj, kiuj tamen, ne sukcesis kontraŭi la sunan sturmon de egipta taghelo, ponardanta tra la latŝutroj la deziratan malhelon, kaj ĉi-tien kaj tien per ora sago pikanta la vernison de la en angulo solide staranta piano. Ĉar kvazaŭsentis ni, ke ŝi tie trovis sian retiriĝejon, ke ŝi akirigis al sia animo korvarman ripozon; kaj ke al si mem ŝi paroladis deŝutante siajn arpeĝojn kaj iajn memoraĵojn.

Mi rompis tamen la nediritan, de ni mem al ni truditan, ordonon neniam eniĝi en la salonon dum la tago, kiam disvolviĝis tiu muzika rito. La per revaĵoj distriĝema adoleskanto, kiu mi estis kaj kiu mi daŭre restas nun, alpremis iutage pretervole la malpermesitan pardonon. La "Nokturno N°14-a laŭ F-dieso minoro" eksonoris desupre-malsupren en la etaĝoj, enŝoviĝante kune kun siaj "polonezoj" vunditteneraj. Tio plenigis mian animon, kaptis min, kaj min mergis en sian plenecon. Kaj, tro malfrue konsciinte pri mia mallertaĵo - kaj eblas, ke mi estis ne tro malkontenta pro ĝi! -, mi enŝteliĝis silentege, sur piedpintoj, ĝis la plej malproksiman brakseĝon, kie mi kaŭre kaŝiĝis, kie mi kuntiriĝante enprofundiĝis, superregate samtempe de timo, pudoro, respekto, kvazaŭ mi estus profananta ian sanktan lokon...

En duonlumo mi vidis mian patrinon oblike balanciĝantan sur sia tabureto kun speciala kliniĝo de la brusto, kun falo de la nigra hararo ruliĝanta sur la delikatkontura nuko, kun ŝia vizaĝo profiliga. Sed sur la alia ŝultro - tiu, kiu restis preskaŭ nevidebla - mi vidis, kaŭrantan laŭ la kutima sinteno, kun proksimigitaj kruroj, *Noĉara*-n milde lulitan de mia patrino, kiu ritme svingiĝis laŭ fluso kaj malfluso de l'muziko. La simiino estis atentege kaptita de la kaskadantaj klavoj, kun tiu specife sia propra seriozece. Sed ofte ŝi levis sian etan inteligentan vizaĝon al tiu de la muzikistino, retroiranta kaj flankenkliniĝanta. Kaj tiam, dum tiu teniĝo, kiu ankaŭ estis al ŝi kutima, en kiu sentebelis neniom da ŝia kutima eksciteco, mi mirege ekvidis, ke ŝi estas retiranta la alian restantan liberan manon, kaj viŝis la okulojn de mia patrino. Temis pri larmoj, kiujn ŝi premis, kies trenajon miaj okuloj, traborante la duonmalhelon, povis sekvi de la palpebranguloj al la vangoj.

Kial do mia patrino ploris? Kaj kial ja

dum ŝi muzikludis Ŝopin-ajon? Ŝajnis al mi, ke neniam ŝi estis atinginta, en plenumo de l' Nokturno N°14-a, tiom korŝiran tenerecon. Kaj tio des pli konvinkis min, ke mi estas malobeinta ian timigan malpermeson, kaj ke mia loko ne estas tie.

Noĉra kuniĝis de longe nun kun mia patrino en la ampleksa Tebio ensinkinta en sablojn de la tempo je la limoj de la vivantoj, kie maldistingiĝas tiuj, kiuj por ĉiam enŝoviĝis en silentan profundon de la teraj abismoj. Mi delonge estis mumiiginta Egiption, mi estis ĝin envolvinta kaj kunpremita en volvaĵtukojn el lino kaj kuŝiginta por ĉiam en sarkofago el malmola sikomorligno de forgeso. Vidu, *Noĉra* ne estis por mi simio kun ridegigaj grimacaraj kaj akrobata lerto. Ŝi estas enŝoviĝinta en ĉiuj faketoj de mia memoro... Tio tiom veras, ke tiu malgranda besto, mia fratino kaj mia similulo, scipovis plilarĝigi la konscion, kiun mi finakiris pri la mondo, kaj ke ŝi ebligis al mi pli bone min koni, malvualiginte min al mi mem...

Kaj fine, la libro "la morto de *Noĉra*".

Noĉra-a morto

Estas *Kut* (la kato), emocitaŭzita kaj spirfrenza, kiu tiun nokton, enŝoviĝinte en mian dormoĉambbron, mildege gratis la littukojn per ungegoj, tirante ilin al si. Kaj, ĉar ĝi ne sukcesis min vekti, ĝi ekmiaŭegis per korŝiraj blekoj, kiuj levigis min abrupte. En mallumo la okulgloboj fikse ardis fantome verdaj, kaj tuj mi komprenis, kiun mesaĝon ĝi portis, sidante surkorse, kun sia kapo levita al mi, laŭ ĝia enigma pozo de besto konsekrita. Mi impetis sekvante lin, pensante: ne malscias la kato, ke min, la unuan, li devas sciigi pri kio okazas, kaj ne mian patrino, aŭ iun ajn alian anon de la familio, ĉar ĝi bone konas la intimecon, kiu kunligas min kun la eta vivulo, kiun estas vizitanta LA NĖPRE NEMALFAREBLO, pri kiu ĝi sentas profundan intuicion.

Noĉra, jese, havis la okulojn plenmalfermitajn; ili estis pli larĝaj ol kutime,

kaj ŝi min rekonis, ĉar svingiĝis ŝiaj palpebroj. Ŝi levis sian rozkoloran malplaton iom malfermitan, kaj al mi ĝin etendis per forto malespera, por streĉega premo, kiu ne delasis min. Kvankam ŝi estis perdanta la spirkapablon, ŝi deziris certigi al mi, ke ŝi gardas plu sian neŝanceleblan fidon al mi, de mi neniam perfiditan. Ja, tiam, dum tiuj momentoj, kiam ŝi mortantis, mi estis leganta en ŝi, kaj min ŝi observadis, plu tradivenis min, per klarvideco ekster homa normala atingo. Ŝi taksis min el fore, tiom fore..., per senlima kompatato, kiu taŭge metis min en mian lokon. Ŝiaj lipoj tremadis. La haŭto de ŝia vizaĝo estis malbrila kaj striata de strangaj spuroj, kaj freneze batis ŝiaj nazloboj. Tamen, ŝi sidis ĉe la limo de la morto, kun daŭre tiom da afableco, tiom simpla, donaciva, preta, kvazaŭ ŝi atendis ĝin delongtempe, ne estante mirigita; kaj ŝi ŝajnis havi pri ĝi delongtempan senton. Lastaj lumetoj de vivo sentebis fare de la etaj movoj levantaj kaj malleventaj ŝian maldikan bruston, dum jam ŝiaj membroj rigidigis.

Mi al mi ŝin kunprenis, kaj ŝi tute cedis, ŝi subiĝis tiel, kiel ŝi ĉiam faris en niaj matenaj kaj vesperaj teneraj ludoj. Ĉar, ĝis la plej lastaj temperoj, antaŭ la fina skuiĝo, la elfina malstreĉiĝo, ŝi plu strebis esti amata de mi; kaj mi kredis vidi, ke ŝi alfluigas al mi mildan rigardon el la fundo de sia agonio. Kaj subite, mi sentis ŝin pli leĝera en miaj brakoj, malplena de sia ekzisto. Tio igis min ekestimi la mian, tio estis iel incanta mian animon je ia ordo de la mondo, ene de kiu neniu alia homa estaĵo povus enkonduki min.

En la fino la pulsobatoj de ŝia koro, malfortiĝintaj, obtuzaj, kvazaŭ sonis kiel el fora fundo, kiel el malantaŭ ega malplena spaco. Ŝia buŝo elkarniĝis, kaj sur ŝiaj okuloj pasis, ilin apenaŭ ne tuŝante, vitreca malhelo, el nedifinebla bluo, kiu ilin senmovigis. Mi havis tempon por mildege mallevi ŝiajn palpebrojn, sur la miraklon de tiu ĉi vivo, el pura ĝojo, kaj kiu estis donacinta, antaŭ ol por

ĉiam haltis la bruo de ties animo, kiu estis altkvalita, sian tutan amon, pri kiu mi dezirus povi rajte diri, ke mi indus ĝin ricevi.

(Kaj jen kiel reagis la kato de la domo, al kiu ŝi estis transportinta sian frustritan patrinecan amon, senĉese dorlotante kaj intime brakumante ĝin)

Kiam ni provis elporti ŝin, por ke ŝi ripozu en la korto ĉe la piedo de tiu daktilpalmo, kiu estis ŝia observejo, kaj la rifuĝejo por ŝiaj meditoj, *Kut* (la kato) sin kroĉis al ŝi kaj malkonsentis lasi nin agi. Ĝin mi prenis en miaj brakoj, sed ĝi rigardegis kaj atentis ĉiujn miajn gestojn. Ĝi ja ne volis, ke oni tuŝas ĝian amikinojn. Ĝi diskrietadis, ĉar ĝi konsciis pri kio okazis, kaj post kiam la eta fostruo estis elfosita, ĝi rifuzis min lasi, kaj ĝia alrokado estis tiom drasta, ke nur pene mi povis elŝiri ĝiajn ungegojn de miaj vestaĵoj. Ĝi senĉese turniĝadis ĉirkaŭ ni kolektiĝintaj ĉirkaŭ la malgranda tomo, plene sentante nur la dramatecon de la morto, kiu obsedis ĝin, eligante miaŭaĵojn afekciajn kaj teneregajn, dum mia ploranta patrino improvizis sia arte ian adiaŭpreĝon al tiu, kiun ŝi nomis "mia infanjo" kaj "mia belanjo". Sidis en la duonfermitaj okulgloboj de la kato tiom da nehelpebla mizerego, ke legeblis en ili la doloro igita de tiu disigo kiel profunda vundego. De tiam, sentegante, ke ĝi estis ĉirkaŭbarita ĉiudirekte, kiel ankaŭ mi mem, de senlima forlaso, tagon post tago ĝi perdis ĉian agemon, ne plu tuŝis iun ajn manĝon, ĝis kiam ĝi konsumiĝis sur la eta tombsteleto, kien ĝi rampaciis kaj sur kiu ĝi restis dormetante, fojfoje provante skrapi kaj plugi la teron, sen trovi en siaj ungegoj la forton sufiĉan por tion fari... Ni elŝatis por ĝi etan truon apud ĝia amikino, kaj ebenigis super ili la teron, kiel kovrilon kuntiritan sur ilia dormego.

El la franca tradukis
Roland PLATTEAU

PRI "L'ÉCUME DES JOURS"

(LA ŜAŬMO DE L' TAGOJ) de Boris VIAN

Estis ĵus filmita filmo, inspirita de "L'écume des jours", fama romano de Boris VIAN. Mi ne vidis la filmon, sed mi certe estas ĝin spektonta...Mi ja havas specialan admiron al Boris VIAN.

Tiom ke mi tradukis esperanten "La ŝaŭmo de l' tagoj". Ĝi aperis en la jaro 2000 en la revuo de UFE "Franca Esperantisto".

Mia admiro estiĝas eble iom el tio, ke li studis en sama "Centra Lernejo de Parizo" kiel mi.

Sed mia admiro – kaj mia decido traduki la romanon – estiĝas certe pro la allogo de la memturmentita malfacila traduki francajn vortludojn, kiuj pensigas min pri la "SCHWARTZ-ajoj", kiujn mi kutimis gustumi ĉiumerkrede en la kabaredo de "La tri koboldoj" dum miaj trijaraj studoj en Parizo.

Kaj mia admiro – kaj mia decido traduki la romanon – estiĝas certe ankaŭ pro la nekutimaj vortkonstruaĵoj, kiuj pensigas min pri la fundamenta aglutina logikeco de ZAMENHOF.

Kaj krome mia admiro – kaj mia decido traduki la romanon – estiĝas certe pro la evidenta eco de la romano "La ŝaŭmo de l' tagoj". Kiu estas, laŭ Raymond QUENEAU, "la plej bela kaj la plej emocia amromano el la mondo".

Cetere de Raymond QUENEAU mi tradukis ĉi-sube la emfazan priskribon pri Boris VIAN.

Claude LONGUE-ÉPÉE

Boris VIAN

Boris VIAN estas viro bone klerigita kaj bone edukita, li estas studinta en Centra Lernejo. Tio ne estas nenio, sed tio ne estas ĉio.

Boris VIAN per "trumpineto" muzikludis kiel neniu alia; li estis unu el la renovigantoj de la keloj en Francio; li priplendis la Nov-Orleanan stilon.

Sed tio ne estas ĉio. Boris VIAN priplendis ankaŭ bi-bop-on.


Sed tio ne estas ĉio. Boris VIAN priplendis ankaŭ sin mem antaŭ homa juĝantaro, pro sia verkado de "Mi iros surkraĉi viajn tombojn" kun subskribo de Vernon SULLIVAN.

Sed tio ne estas ĉio. Boris VIAN verkis tri aliajn pseŭdoepigrafojn.

Sed tio ne estas ĉio. Boris VIAN tradukis ververajn usonajn verkojn absolute aŭtentikajn, kaj eĉ kun lingvaj malfacilaĵoj apenaŭ kredeblaj.



Raymond SCHWARTZ rolanta en "Angoroj". (Arno Lagrange – Vikipedio)



Sed tio ne estas ĉio. Boris VIAN verkis teatraĵon: "Bestkadavrejo por ĉiuj", kiu estis ludita de veraj aktoroj, sur vera

scenejo, malgraŭ sia intence intensa provokemo*.

Sed tio ne estas ĉio. Boris VIAN estas unu el la fondintoj de unu el la plej sekretaj Parizaj socioj, la Klubo de l' Sciencaventuristoj**.

Sed tio ne estas ĉio. Boris VIAN verkis belajn librojn, strangeĝajn kaj kortsuĝajn: "La ŝaŭmo de l' tagoj" estas la plej emocianta el la nuntempaj amromanoj; "La Formikoj" estas la plej termitanta el la noveloj pri la milito verkitaj; "La aŭtuno en Pekino" estas verko malfacila kaj ne konata.

Sed tio ne estas ĉio.

Ĉar ĉio tio nenio estas; Boris VIAN estas estiĝonta Boris VIAN.

Franclingve originale verkita de Raymond QUENEAU
Alesperantigita de Claude LONGUE-ÉPÉE

* En la franca originalaĵo, Raymond QUENEAU skribis: "Pourtant il n'y avait pas été avec le dos de la Q.I.R."

** Tiu kiu povas en Esperanto taŭge esprimi la vortfaradon kaj la vortenhavon de la franca VIAN-a "savanturier", bonvolu sin konigi al mi (eble eksmembro de tiu eminenta rondo?)

Tradukis Claude LONGUE-ÉPÉE,



Boris VIAN ludanta per sia muzik-instrumento: trumpineto.

Originale franclingva novelo verkita de **Lydie BOUELLE** **La telerbretaro** (dua parto)

Ĉapitro 3-a – LA DILEMO

Paŭlo ĵus eltrinkis sian bieron.

Li stariĝas kaj li aliras al la dormoĉambro de *Sam*. Li volas al li iomete paroli, profiti la neĉeeston de lia patrino, por havi duopan diskuton. Li frapas la pordon kaj li eniras.

Sam hastege ĉesigas sian pertelefonan konversacion kaj levas al sia patro rigardon, en kiu miksiĝas surprizo, malpreciza timo, tre certa inciteto.

Tia akcepto ne facilas por Paŭlo, sed li adaptiĝas. Laŭ la maniero de veturilo bezonata varmiĝi por doni sian potencon, li unue dankas lian filon pro lia helpo por la telerbretaro, tiel precizigante al li, ke la incidento kauxzita de ties sterniĝo estas finita, kaj ke ne estos bedaŭrinda sekvo por iu ajn.

Li plu parolas, demandante lin pri tio kion li faras, pri lia farto, pri liaj kamaradoj, pri la lernejo, pri la junulinoj. Ĉu li havas problemojn? *Sam* servas al li siajn kutimajn lakonajn respondojn. Tio sufiĉas por li. Li ne dubas ke, se lia filo havus apartajn malfacilaĵojn li estus informita. Li

estas sufiĉe atentema al *Sam* por esti certa, ke li mem pri tio ekkonscius. Tiukaze li scias, ke li devus foriri kaj lasi lin trankvila; sed li ne kapablas malhelpi sin, iakaŭze, rememorigi al *Sam* la malbonfarojn de la narkouzado, de la trouzo de alkoholo, de la surskoteraj nesingardemoj kaj de la aidesaj riskoj. *Sam* jam scias tion: “*Li ne estas idiota, ankaŭ li rigardas la informaĵojn*”.

Paŭlo finfine ekdecidas forlasi la dormoĉambron, silente furiozante denove kontraŭ si mem. Plian fojon li fiaskis.

Li vidas siluetiĝi malantaŭ *Sam* la viron, kiu li estas estiĝanta. Li deziras starigi alian specon de rilatoj kun li; sed li ne sukcesas eksteriĝi el sia rolo de patro. Li sukcesas nur eldiri al li moraligajn kaj sekurigajn paroladojn. Li ripetas de sia propra patro la konduton, kiun li tiom bedaŭris je la aĝo de *Sam*. Ankaŭ li ne kapablas proponi tiun malfermiĝon, kiu donus al *Sam* la deziron sin konfidi al li.

Li tre bone memoras, ke kiam li estis adoleskanto, se li ne parolis pri sia

vivo al siaj gepatroj. Ne estis pro timo aŭ tial ke li devis kaŝi al ili malpermesitajn aferojn, sed estis tial ke li ne deziris dividi tion kun ili. Nenio elmontris al li, ke ili povas partopreni liajn ĝojojn aŭ liajn ĉagrenojn, aŭ liajn zorgojn. Kaj tio pro la simpla kialo, ke malantaŭ siaj prizorgoj kaj siaj diroj, ili strebis nur instigi lin alpreni ilian propran moralon. Li tute same kondutis kun *Sam*... Alian fojon... Eble...

Reveninte en la salonon, li ŝaltas la televidilon kaj mallaŭtigas la sonon. Li kuŝiĝas sur la kanapon kaj fermas la okulojn. La vero estas, ke li bezonas pripensi. La incidento de la telerbretaro, pro sia subiteco kaj materia perforto, deŝiris vualon, kiu antaŭe kaŝis veran perturbon. Li scias, ke neniu venos ĝeni lin kaj, kiom longatempe li restos en tia sinteno, neniu provos vekti lin, paroli al li aŭ eĉ kunpreni lian spacon. Jam de pluraj jarkvinoj la regulo estas alprenita. Lia pasinta kolero, lia vera kolero, tiu kolero kaŝkaŭranta en la ombro de la



ŝajniĝoj, tiu kolero kiu en li loĝas, ĝis nun obtuze, trovas sian fonton en la tento, la forta tento, kion li sentas, al subfalo en la allogaĵojn de *Gaëlle*, la nova sekretariino, kaj kiun li rifuzis ĝis nun atente konsideri.

Li jam kokris Paŭlinon. Unu fojon, antaŭ dek jaroj. Li irintis en la salonon de la aŭtomobilo, sola. Paŭlino kun *Sam* restis hejme.

Tio estis procirkonstanca afero, sen sekvo, eĉ sen diro de patronomo. Li hezitis antaŭ ol decidi nenion diri pri tio al sia edzino. Por li tio estis negrava. Tiu tre mallonga aventuro neniel havis rilaton kun Paŭlino, kun la amo, kiun li havis al ŝi, kun ilia geedziĝo. Li neniam emis pensi, ke estus same por ŝi, se li konfesus tion al ŝi pretekste pro honesteco. Ŝi neniam povintus, kaj cetera ne povus hodiaŭ, konsenti tion, ne venĝemante, ne suferante, ne kontestante ilian vivon kaj ne perdante la fidon, kiun ŝi havas al li. Li silentis kaj plu silentas. Estis facile, ĉar li tre rapide kaj senstrebe forĝesis tiun anekdoton. Li pri ĝi neniam pensis. Li sentas sin viro fidela kaj sindonema al sia familio. Li nenion riproĉas al si pri la pasinteco.

Sed hodiaŭ la aferoj estas senteble malsamaj. Li ne sentas por *Gaëlle* deziron, kiun li povus plensatigi en unu vespero. Li simple sentas sin komforta kun ŝi. Nenio jam okazis.

Ili estigis, kvazaŭ je la unua ekrigardo, rilaton bazitan sur la allogeco. *Gaëlle* scias, ke li edziĝis, kvankam pri tio li neniam parolis al ŝi. Lia situacio ebligas al ili daŭrigi tiun fazon, kiu ilin ŝirmas. Ili povas kondukti kvazaŭ nenio estus, kvazaŭ ili estus simplaj laborkolegoj.

Paŭlo povas esperi, se li daŭrigas tiun antaŭstaton, ke la aferoj glatiĝos, kaj ke la anekdoto estas mem mortonta. La voĉo de la prudento sufloras al li tiun solvon.

Sed precize, li neniel deziras, ke tio ĉesu. Li volas daŭre senti tiun emoci- on, kiam neantaŭvidante li ekvidas ŝin ĉe la angulo de koridoro. Li volas povi pensi pri ŝi kaj ekzaltiĝi je siaj pensoj. Li volas povi sin senti pli juna, pli vivoplena, sin senti en danĝero kaj feliĉa. Li volas pli scii. Ĉar la

sentoj de li sentitaj al *Gaëlle* feliĉigas lin, kiam ili superregas lian anim- staton. Tio tute ne estas konstanta stato. Plejofte, li estas disŝirata de siaj skrupuloj. Tion li ne povas fari. Li ne povas riski detru- i la vivon, kiun li al si konstruis, tiun de Paŭlino, tiun de *Sam*. Estas memkompreneble por Paŭlo, ke li devos elekti, ekdecidi, rapide.

Tiu dilemo malstabiligas lin. Li balanciĝas kiel horloĝa pendolo. Je unu pendolbato, li ekvidas la seren- econ pere de la rezigno pri tio, kio estiĝas sensekva simpla allogo. Je la sekvanta pendolbato, li estas invad- ata de sento de frustr- o, de preskaŭa maljusteco, kiu justigas la transpaŝ- adon de ĉiuj liaj principoj kaj de ĉiuj liaj valoroj. Elmontre, li estas super- regata de sia senpoveco solvi tiun problemon.

Tio elĉerpas kaj incitas lin. Li estas preta nek sin ĵeti en la aventuron, nek rezigni pri ĝi. Finfine li ekdormas.

Li vekigās aŭdinte Paŭlinon eniri. Li ne sonĝis. Neniu lumo venis lumi liajn tenebrojn. Li rektiĝas kaj akcept- as Paŭlinon: "Nu, mia karulino, ĉu vi trovis kion vi serĉis?"

Ĉapitro 4-a – LA DUBO

Paŭlino trinkas kafon, sin apogante ĉe la embrazuro de la kuireja fenestro. Ŝi lasas sin lulata de siaj pensoj, rigard- ante eksteren. Ŝi estas sola, ŝi ne enuas. Jen, de jaroj ŝi ne plu enuis.

Ili decidis, kun Paŭlo, ke ŝi ne laboros. Ili perfekte interkonsentis pri tiu punkto. Ŝi neniam intencis sin ĵeti en iun ajn profesian karieron, kaj mal- pleje trovi nutran laboron. Koncerne Paŭlon, kiu estis edukita de patrino tre profesie aktiva, li revis nur vivi kun ĉehejma virino. Komence de la ge- edzeco, Paŭlino aktivigante pasigis siajn tagojn, dumsemajnajn aŭ semajnfajnajn. Ŝi neniam povis resti nenion farante. Kiam *Sam* estis nask- ita, la fenomeno ankoraŭ plie kaj nature akcentiĝis, tiagrade ke okazis, ke Paŭlo devigis ŝin sidiĝi, metante en ŝiajn manojn la magazinon de li jus alportitan al ŝi. Tiu speco de frenezeco daŭris ĝis la tago, kiam ŝi ekkonsciis, ke malantaŭ tiu mal-

kvieto, estas sento pri kulpeco, volo esti tiagrade okupata kaj tiagrade utila, ke neniu povus iam riproĉi al ŝi ne profesie.

Tiu konstato preskaŭ dubigis sian dekomencajn elekton, sed pripens- inte ŝi mezuris la insidan perversecon de tia ideo. Ĝi estis la relajo de iu taksado de la vivo, kiu metis la virin- ojn al ŝi similajn en la kategorion de la asistataj virinoj. Nu estis ja sciite, kiel diris al ŝi Izabela, ke neniu bezonas justigi sian ekziston, ĉu rilate al la sociaj reguloj, ĉu al la estetikaj reguloj, ĉu al iu ajn regulo. Ŝi reagis kontraŭ tiu psikologia terorismo, kaj ekde tiam ŝi neniam plu enuis malgraŭ la grandaj tempospacoj, kiam ŝi faras nenion.

Ŝi travivas agrablan kaj trankvilan vivon, apud homoj, kiujn ŝi amas kaj kiuj ŝin amas. Ege malofte ŝi malbone statas. Tamen, post la incidento de la telerbretaro, ŝi sentas ian ĝenon. Ĉio vere ne plu samas. Estas nenio vere konkreta, pli ĝuste estas iu impres- o. De post tiu tago, ekzemple, Paŭlo reenhejmiĝas vespere pli malfrue ol kutime, kaj semajne li silentas, solig- ante sin en la garaĝo por brikoli aŭ siestante sur la kanapo de la salono. En tio estas nediskutebla signo, ke io lin turmentetas. Ŝi plurfoje demandis lin, kaj ĉiufoje ŝi ricevis la saman respondon: li havas laboregon en la oficejo kaj li estas laca. Jen la tuta afero. Li estis trankviliganta ŝin, cert- igante ke ĉio glatas. Ŝi ripetis la demandon, sed ne insistis malgraŭ la malkontenteco al ŝi lasita de la respondo. Ĉion konsiderinte, ŝi persvadis sin, ke tiu respondo estas verŝajne la vero.

Sammaniere, Izabela ŝajnas esti forprenita de ekstertera potenco. Kutime, ili ĉiutage telefonas unu al la alia, ili kune tagmanĝas dufoje ĉiu- semajne, ili promenas almenaŭ dum momento ĉiusabate, eĉ se estus nur por butikumi.

Nu de kiam ili aĉetis la mantelon, ŝi ne vidis ŝin kaj apenaŭ parolis al ŝi. Izabela estas tre okupita, ĉiam urĝ- ata. Ŝi ne havas tempon, ŝi havas multon por fari. Kiam Paŭlino

proponas helpoj al ŝi por la hejmaj taskoj, aŭ por klopodoj, kiujn ŝi povus plenumi anstataŭ ŝi, ŝi rifuzas, dankante ŝin. Nun estas ja la unua fojo, kiam Izabela ne tuj profitas la okazon, por fariĝi al ŝi sian mastromadon aŭ sian gladadon. Tamen ŝi asertas, ke ĉio glatas, kaj ŝi ridas, kiam Paŭlino diras al ŝi: "Mi scias, ke vi kaŝas ion al mi, mi tion sentas".

"Vi eraras Paŭlino, Via imagoj trompas vin. Ĉio glatas; mi rediris al vi. Bone, mi forlasas vin. Kisojn, mia karulino". Sam, li feliĉe bone statas. Li restas sensanĝa, malmulte ĉeestanta, malmulte babilema kiam li ĉeestas; insiste petante ĝustatempe sian poŝmonon. Estas certe, ke li ne estas pli perturbata ol kutime.

Kvankam la telerbretaro disfalis kun granda bruo, kaj kvankam ĉiuj estis ŝokitaj, Paŭlino ne povas imagi, ke tiu incidento estas la kaŭzo de la ŝanĝiĝo de la agmaniero de Paŭlo kaj de Izabela, kaj sekve de la maltrankvilo, kiu konsumas ŝin. Eĉ se ŝi stumblas sur la simbola karaktero de la sceno, kiel tia sinsekvo povus okazi?

Revigliĝas ŝiaj memoraĵoj. Nenio estas dirita. Eĉ ne estas starigita la demando pri iu anstataŭigo. La malpleneco de la kuirejo estas netuŝita, ĉiu ŝajne alktimigiĝis al ĝi. Ŝi mem anstataŭigis la nepre bezonatajn teleraraĵojn, sin rezervante akiri pli poste novajn beletajn aĵojn.

Paŭlo, eĉ se li malfrue vespere rehejmeniras, estas la sama, komplezema. Sed kio okazas? Ĉu ŝi diris aŭ faris ion, kio malplaĉus al ŝia edzo kaj al ŝia fratino? Ne, tion ŝi ne kredas. Aŭ eble ili disputis unu la alian. Paŭlo ne estis tre gastigema al Izabela. Sed poste Paŭlino estis tie. Ŝi estus rimarkinta, se Izabela vere malakceptus tion, aŭ se estus ia sekvo. Kaj unu aŭ la alia estus parolinta al ŝi pri tio.

Ŝi povas starigi la demandon. Unue ŝi telefonas al Izabela, poste al Paŭlo. Ambaŭ ili same respondas: Ne! Kial tia demando? Ŝi tute devojiĝas.

Ne konvinkite, Paŭlino proponas kune vespermanĝi ĉi-vespere; sed Izabela ne estas libera kaj Paŭlo malfrue rehejmeniros.

Reeniĝante en sin mem, ŝi rekompencas sian internan enketon. Ekster la konvinko, kiu turmentegas ŝin, ke io ne glatas, kaj ekster la maltrankvilo, kiun ŝi sentas, ŝi trafas nenion konkretan. Ŝi do ĉesus serĉi, sed ŝi daŭrigas sian malserenan revadon, kiu alkondukas ŝin sur la randojn de la tumulta fluo, kiu iĝus ŝia vivo, se ŝia edzo kaj ŝia fratino ĉesus ludi la rolon, kiun ĝis nun ili ludis. Kiel ŝi povus alfronti la foriron de Paŭlo aŭ tiun de Izabela? Ŝi ĉiam vivadis kun ili, aŭ preskaŭ ĉiam rilate Paŭlon. La apogilo, kiu estis Izabela por ŝi ĝis ŝia edziniĝo, estas de tiam amplekse anstataŭigita de Paŭlo.

Ĉu ŝi vere kapablas ekrespondeci pri si mem, mem elturniĝi? Ŝi ĉiam pensis ke jes, ke nur la cirkonstancoj kaj la elektoj pri sia vivo okazigis, ke ŝi iĝis en submetita stato. Ne ŝia naturo estas la kaŭzo. Ŝi en la vivo de Izabela vidas la pruvon de tio. Saman zodiakan signon, saman astroinfluan, ili havas similajn personecojn, faritajn, ili havas similajn personecojn, faritajn el kvazaŭ identaj proprecoj. Ili ne uzadas la samajn, jen tie kuŝas la sola diferenco. Kaj tamen, necesas konstati, ke hodiaŭ eblas dubo. Jam de longa tempo ŝi ne faris la plej etan aferon, sen la ĉeesto aŭ la helpo de Paŭlo aŭ de Izabela, aŭ eĉ de Sam.

Ŝi pretas sin ĵeti en la defetismon, en la frapantan memkritikon, kiam demando, ilustriva de la de ŝi orkestrata interna debato, ekaperas en ŝian menson: "Ekzemple, kion vi farintus el la telerbretaro, se Paŭlo kaj Sam ne estus tie por helpi vin munti ĝin, kaj se Izabela ne alvenus por helpi vin pluki la pecojn?".

Granda ekrida akompanas ŝian silentan respondon: "Unue mi neniam estus ĝin aĉetinta, kaj sekve ĝi neniam estus sterniĝinta!".

Ŝi tuj sin sentas multe pli bonfarta. Ŝi decidis iri promeneti en la urbo Ŝi prenas sian sakon, sian mantelon, kaj sian aŭtoŝlosilon, kaj ŝi ŝlosas la hejman pordon, grumbletante: "Ili iru diablen!".

Stariĝas la demando, sed ŝi ne strebas por ĝin respondi: "Kiuj estas ekzakte ili?".

Ĉapitro 5-a – LA ELIRO

Estas nekredinde. Izabela dronas en surprizo. Ŝi malŝaltas la telefonilon, ne salutinte, kaj ŝi malrapide sidiĝas sur la fotelilon malantaŭ si. Ŝi sentas kaptuniĝon. Pluraj emocioj forte karambolas en ŝia koro, en ŝia stomako, en ŝia kapo.

Estas nekredinde. Ŝi ripetas tiun frazon kiel litanion. Ŝi neniel malsanas! De pluraj semajnoj ŝi vivas kun tumoro en la cerbo, kaj nun ŝi ekscias, ke ŝi malsanas pro nenio.

Kio okazas en ŝi, tio estas nepriskribebla. Estas nekredinde.

Kaj fakte tion ŝi ne kredas. Ŝi scias, ke tio veras, sed ŝi ne sentas la grandegan kvietigon, kiun devus estigi tiu ekscio.

Tamen ŝi havis nenian malfacilon tuj encerbigi la malan informon, kiam oni sciigis al ŝi, ke ŝi estas kondamnita je morto, post tempolimo nedefinita sed relative baldaŭa, pro tumoro en la cerbo.

Post kvazaŭa digesto, peniga, ŝi finfine prenis sur sin tiun fakton, tiun staton. Ŝi sufiĉe rapide povis serioze kaj metode pripensi tion, kaj ŝi povis eltrovi laŭirendan vojon. Kiam estis aranĝita la demando pri la transvivo, ekstaris tiu pri la ebla kuracado. La kerno de la debato kuŝis en la ĥirurgia operacio: ĝia fina utileco, ĝiaj riskoj. Tre argumentita diskuto kun ŝia kuracisto, kaj esplorado per la reto, helpis ŝin finekti sian decidon, cetere kongruanta kun sia instinkta reago: oni ne operaciu ŝin.

Poste venis la demando pri la daŭro de vivo al ŝi restanta. Tio povis daŭri de ses ĝis dekok monatoj, laŭ la evoluo de la tumoro. Ŝia kuracisto tamen estis sufiĉe optimisma, ĉar ŝi havis malmulte, eĉ neniom da simptomoj, kio enorme mirigis lin.

Fino de la dua parto (daŭrigota en la venonta numero)...

Tradukis Jean DIETRICH

Atentigo de la redaktoro

Supozeble, jam de pli ol unu monato, finiĝis viaj ferioj kaj ripoztempoj, kiujn mi esperas por vi kiel eble plej agrablaj kaj plenaj de belaj memoraroj. De nun vi do havas tempon por legi vian gazeton; por sendi al ni viajn rimarkojn, komentojn kaj kritikojn; por starigi viajn Esperanto-kursojn kaj venontajn kunsidojn de viaj grupoj; por verki viajn artikolojn kaj agadraportojn por la Norda Gazeto; por sendi ilin antaŭ la 20-a de Decembro kaj la jarfinaj festoj... Kiujn mi ekde nun deziras al vi kiel eble plej agrablaj!...

Ni ja intensigu niajn rilatojn inter redaktantoj kaj legantoj. Iam asertis al mi, ke "li ne legas la revuon, kiu cetere ne logas lin interalie pro manko de fotojjo..."

Nu! Se vi ne legas la revuon, diru al mi. Mi ĉesigos vian abonon kaj tiel la federacio ŝparos monon! Aliflanke, se vi deziras admiri pli multe da fotoj, ne forgesu sendi viajn artikolojn kun multaj belaj fotojjo... Inter kiuj ni povos elekti!

Pri pli intimaj rilatoj inter nia federacio kaj UFE.

Ne hezitu sciigi al mi viajn rimarkojn pri la politiko kaj la agado de UFE. Mi raportos pri tio en la UFE-komitato, en kiu mi estas via reprezentanto. Debatu en viaj grupoj pri la eventualeco de komuna aliĝo "UFE – NF – Loka Grupo" laŭ la regularo de mi prezentita en nia pasinta Junia numero.

Sciigu la sintenon de via grupo al ties reprezentanto(j) en nia NF-komitato.

Se eble, konvinku viajn samgrupanojn – kaj de vi konatajn sendependulojn – aliĝi al la NF kaj al UFE.

Pri la kursoj kaj ekzamenoj.

En ĉi-tiu numero nia prezidintino *Arlette* tute prave priantis la sukceson de Araso en la organizado de Juniaj KER-ekzamenoj. Ni daŭrigu tiun politikon de KER-ekzamenoj. Sed ni ne forgesu la FEI-ekzamenojn, kaj aparte la trianivelajn FEI-ekzamenojn.

Laŭ la novaj leĝaj eblecoj, rilatu kun la instruistoj de viaj proksimaj lernejoj, por eventuale instrui E-kursojn al la CM1-CM2-anoj, kadre de la "Novaj lernadaj ritmoj" kaj de la "Aktivadoj ĉirkaŭ-lernadaj".

Claude LONGUE-ÉPÉE

Asociaj kaj redakciaj informoj

FÉDÉRATION ESPÉRANTO NORD Prezidanto (eldona direktoro de la gazeto):

Michel DECHY
65 Allée Crémaillère
59650 VILLENEUVE-D'ASCQ
Tel : 06 16 98 41 02
mdechy@esperanto-nord.org

Sekretario:

Katja BOEN
51 Avenue du Maréchal Leclerc
59130 LAMBERSART
Tel : 03 20 92 31 36
cboen@esperanto-nord.org

Kasisto:

Xavier VILAIN
Résidence L'Alcyon – Apt. 41
90 rue du Maréchal Joffre
59240 DUNKERQUE
Tel. 06 70 65 93 29
xvilain@esperanto-nord.org

Tarifo de kotizoj:

13 € por plenkreskulo, 8 € por junulo, studento, senlaborulo.
Per ĉeko al la ordo de "Fédération Espéranto-Nord" sendota al la kasisto.

BULTENO "NORDA GAZETO" Ĉefredaktoro:

Claude LONGUE-ÉPÉE
320 rue des 4 Bons Dieux
59235 BERSÉE
Tel. 03 20 59 28 80
plongueep@free.fr

Federacia retejo:

<http://www.esperanto-nord.org>

Konstantaj korespondantoj:

★ **Amiens**
Cyrille DÉCOUTURE
kontakto@esperanto80.org
★ **Arras**
Jean HENNEBERT
jhennebert@esperanto-nord.org

★ **Boulogne**
Marie-Jeanne LINÉ
mjline@esperanto-nord.org

★ **Dunkerque**
Elise DEPLA
edepla@yahoo.fr

★ **Lille-Villeneuve**
Katja BOEN
cboen@esperanto-nord.org

★ **Valenciennes**
Jean-Marc FRATARD
jmfratard@esperanto-nord.org

Enpaĝigado:

Cyrille DÉCOUTURE
10 chemin des Oiseaux
76270 FESQUES
kontakto@esperanto80.org
Tel: 06 78 80 78 45

Kontrolantoj-korektantoj:

Claude Longue-Épée
plongueep@free.fr
Pascal VILAIN
p.vilain83@orange.fr

Presado, enkovertigo, sendado:

Richard VALET
Rue du Boulenriez 59235 BERSÉE
rf.valet@wanadoo.fr

La teksto de artikoloj estu sendotaj antaŭ la 25-a de Novembro 2013 por aperigo antaŭ la jarfinaj festoj.

Partoprenis je tiu ĉi numero

Arlette PLUTNIAK, Jean HENNEBERT, Claude LONGUE-ÉPÉE, Cyrille DÉCOUTURE, Xavier VILAIN, Michel DECHY kaj Katja BOEN, Jean DIETRICH, Bernadette MANIER kaj Thérèse-Marie FRENOY, Roland PLATTEAU.